



Monata organo de Polaj Esperantistoj
Miesięcznik, organ Esperantystów
Polskich

La Redakcia Komitato:

Redaktoro. D-ro **Leono Zamenhof.** *Membroj:* Pastro Prof. **Al. Dąbrowski,** Ing. **Ant. Grabowski,** **A. Zakrzewski,** **Leo Belmont,** **A. B. Brzostowski** kaj eldonanto **Jan Günther.**

Aŭtoro de Esperanto D-ro **Ludoviko Zamenhof** helpas al la Komitato per siaj konsiloj.

Jara abonprezo: Rb. 2.50—~~2~~\$ 2.65—Fr. 6.75—M. 5—Kr. 6.25.

Adreso de la Redakcio:

VARSOVIO.

Adreso de la Administracio:

str. Marszałkowska 143.

str. Hoża 20 m. 12.

„Esperantysta Polski”

Miesięcznik, Organ Esperantystów Polskich

Roczna prenumerata wynosi w r. 1910 rb. 2.50 k.
wraz z przesyłką pocztową.

Adres: Administracji—Warszawa, Hoża 20,
Redakcji—Marszałkowska 143.

„Pola Esperantisto”

Monata Organo de Polaj Esperantistoj

Jara abonpago en 1910 jaro 2 r. 50 k. (2,65 Sm.)
kun la poŝta transsendo.

Adreso de Administr: Varsovio, str. Hoża 20,
de Redakcio—str. Marszałkowska 143.

En la Administracio de „POLA ESPERANTISTO” estas acetebblaj

„LA JUGO DE OZIRIS” — belega satira majstro-
verkode Henryk Sienkiewicz, tr. A. Grabowski 25 k.

„PROTESILAS KAJ LAODAMIA”. Tragedio de St.
Wyspiański, trad. D-ro Leono Zamenhof — 50 k.

„AVE PATRIA, MORITURI TE SALUTANT” de Wła-
dysław Reymont, trad. D-ro Leono Zamenhof 25 k.

„CONSILIUM FACULTATIS” unuakta komedio de J.
A. Fredro, trad. el pola lingvo A. Grabowski. 40 k.

„KELKAJ NOVELOJ” el diversaj aŭtoroj. Trad. A. Os-
sowski, H. Hempel, Kuhl, Gorgan, N. Kordo. 25 k.

„Improvizacio de Konrad” el „Dziady de A. Mickie-
wicz, trad. Roman Iwo Dobrzański — 25 k.

„JĘZYK MIĘDZYNARODOWY ESPERANTO”, arkusz
propagacyjny, — 2 k., 100 egz. 1.20 k.

„SŁOWNIK ESPERANCKO-POLSKI” na jednym arku-
szu do naklejenia na tekturę. Naklejony 25 kop.
nienaklejony 15 kop.

„KIO OKAZIS FOJE EN SIDONO” — novelo de
H. Sienkiewicz, tradukis A. Grabowski — 25 k.

„EN FUMEJO DE Ĉ“OPIO” — novelo de Władysław
Reymont, tradukis D-ro K. Bein (Kabe) — 20 k.

„NOVA ANTOLOGIO” kolekto de poemoj de divers-
aj poetoj, tradukis A. Grabowski. — 25 kop.

„NI SEKVU LIN” de H. Sienkiewicz. Tradukis Br.
Kuhl. (64 paĝ.) — 40 k.

„MIA LIRO”, kolekto de poemoj de D-ro Leono Za-
menhof (Lozo) — 25 kop.

„Adresaro de Polaj Esperantistoj” 1909 j. Prilaboris
A. B. Brzostowski — 30 k.

„KLUCZ ESPERANTO” de Ĉefeĉ, pola eldono, —
2 kop., 50 egz. — 80 k.; 100 ekz. — 1 rb. 50 k.

„SŁOWNIK ESPERANCKO-POLSKI” w broszurze, pod
red. D-ra L. Zamenhofs, wydanie „POLA ES-
PERANTISTO”. Cena 20 kop.

Jarkolekto 1908 de „Pola Esperantisto”—broŝurita § 1.50.

Jarkolekto 1909 de „Pola Esperantisto”—nebroŝurita § 2. —

Por la Abonantoj de „POLA ESPER.” la supre signitaj prezoj estas malgrandigataj.

Od Administracji „Pola Esperantisto”.

Uprasza się p. p. prenumeratorów o zawiadomianie Administracji „Esp. Pol.” (Ho-
ża 20) o zmianie adresu. Nieregularny odbiór pisma bywa prawie wyłącznie skutkiem nie-
zakomunikowania nowego adresu.

Ekspedycję pisma dla członków „Pol. Tow. Esp.”, uskutecznia Zarząd T-wa,
upraszamy więc ze wszystkimi reklamacjami zwracać się do p. Bibliotekarza Towarzy-
stwa (Koszykowa 57).

Ze wszelkimi reklamacjami prosimy zwracać się tam, gdzie została opłacona pre-
numerata. Administracja bezpośrednio przyjmuje reklamacje tylko od tych pp. prenume-
ratorów, którzy nadesłali swe zamówienia i prenumeratę wprost do Administracji „Pola Esp.”

POLA ESPERANTISTO

Monata Organo de Polaj Esperantistoj



ESPERANTYSTA POLSKI



Organ Esperantystów Polskich

Jan.—Febr. 1910.

WARSZAWA—VARSOVIO.

Jaro III (V) Nr. 1-2.

O Esperancie i jego twórcy.

Słowo wstępne, wypowiedziane w Warszawie d. 19 Grudnia 1909 r. na wieczorze muzikalno-wokalnym, urządzonym przez Polskie Towarzystwo Esperantystów).*

Szanowni Słuchacze!

Wieczór ten jest niejako skromnym listkiem w olbrzymim wieńcu, który w pięćdziesiątą rocznicę urodzin naszego ziomka D-ra Ludwika Zamenhofa, składają mu tysiące jego wielbicieli, rozsianych na całej kuli ziemskiej.

Jakiegoż to wielkiego dzieła dokonał ten człowiek, że sobie w tak szerokich kołach na taką wdzięczną cześć zasłużył?

Żyjemy w wieku cudów techniki, wieku pary i elektryczności, wieku potężnej, opasującej cały glob ziemski, komunikacji na lądzie i morzu, a jutro mamy się stać ostatecznie panami powietrza

Ziejący parą potwór, sztuczny koń żelazny, stokroć potężniejszy od swego naturalnego, wytworzonego przez wieki ewolucji organicznej, brata, przenosi nas w szalonym pędzie z miejsca na miejsce, z kraju do kraju, przepływa morskie odmęty, niosąc nas z lądu do lądu. Życie zapulsowało na ziemi przyspieszonym tętnem. Ludzkie mrowisko ruszyło się i obiega ziemię, bo łączy je tysiąc spraw wspólnych, bo gna je w odległe strony nadzieja lepszego bytu, bo nęci udoskonalona do ostatnich granic lokomocja.

Ale ludzie różnych stron świata, zyskując coraz większą łatwość stykania się ze sobą, odczuwać muszą zara-

zem coraz więcej trudność komunikacji duchowej, brak duchowego łącznika wśród osób, należących do różnych narodowości i mówiących różnymi językami, jednym słowem brak jednego, ogólnie przyjętego, pomocniczego języka międzynarodowego.

Zdawało by się, że brakowi temu mogłoby zaradzić przyjęcie jednego z języków narodowych, lub martwej łaciny. Czyż nie wiemy jednak, ile trudności przedstawia przyswojenie każdego obcego języka, ile to czasu traci nasza młodzież, z krzywdą innych dziedzin wiedzy na naukę obcych języków, i że mimo to żadnym z nich należycie zawładnąć nie jest w stanie; bo łatwym jest tylko język, którego nas uczy matka, rodzina i całe otoczenie, t. j. język ojczysty.

Lecz nie tylko ta trudność w przyswojeniu sobie języka obcego narodu stała na przeszkodzie przyjęciu któregokolwiek za międzynarodowy. Przeszkadzały takiemu uprzywilejowaniu języka jednego narodu, ambicje i interesy wszystkich innych, w tym razie upośledzonych; bo zaiste naród, którego język przyjętoby za międzynarodowy, zapanałaby nad światem.

*) Przemówienie to podajemy w skróceniu, opuściwszy zeń, dla braku miejsca, poglądy na budowę Esperanta i niektóre dane historyczne, znane już naszym czytelnikom. A.G.

Tak więc tylko język stokroć łatwiejszy od wszystkich narodowych, tylko język zupełnie neutralny może zadośćuczynić coraz bardziej dającej się odczuwać potrzebie języka międzynarodowego, a ponieważ takiego języka nie było pomiędzy naturalnymi, więc należało go stworzyć sztucznie.

Nad tym wielkim zadaniem, nad tą utopją, bo wszystkie wielkie idee są utopjami, zanim się doczekają urzeczywistnienia, pracowały w przeciągu ostatnich trzech wieków setki najpotężniejszych umysłów.

Dopiero jednak w Esperancie doczekała się ludzkość ostatecznego rozwiązania wielkiego problemu, otrzymawszy język przypominający swą dźwięcznością włoski lub hiszpański, a przytym giętki, bogaty i stokroć łatwiejszy od każdego z języków naturalnych.

Wszystkie apriorystyczne zarzuty, które robiono idei języka międzynarodowego, wszelkie wątpliwości upadają wreszcie wobec dokonanego faktu. Esperanto, przeszedłszy dwudziestokiloletni okres ciężkich prób, zwyciężył obojętność ludzką, rozlał się szeroką falą po całej kuli ziemskiej. Zyskawszy setki tysięcy zwolenników, zapuściwszy głęboko korzenie w umysłach i sercach ludzkich, język ten sztuczny nabral żyć, stał się językiem naprawdę żywym. Ogarniając coraz szersze koła, nie tylko się nie wypaczył, ale stając się coraz bogatszym, coraz doskonalszym, nie traciła swej pierwotnej prostoty, rozwija się wszędzie jednakowo, dzięki ożywionej komunikacji duchowej wśród Esperantystów całego świata*). O jedności mowy pisanej świadczy rozrastająca się potężnie literatura i prasa esperancka, a co do jedności żywej mowy i wymowy najlepsze świadectwo wydają wszechświatowe Kongresy esperanckie, na których parę tysięcy ludzi, przedstawicieli kilkudziesięciu przeróżnych narodów, zbiera się corocznie ze wszystkich krańców świata i posługuje się

między sobą Esperantem tak poprawnie i potocznie, jak gdyby ta rzesza mówiła nim od urodzenia. Ludzie, znalazzy się po raz pierwszy na takim kongresie, doznają dziwnego uczucia: Zdaje im się, jakoby patrzeli na powtórzenie wielkiego cudu, gdy to, po zesłaniu Ducha Św. w dzień Zielonych Świątek, apostołowie, według słów ewangelji, zyskali możność przemawiania do wszystkich narodów.

Zdaje się, że ludzkość doczekała się wreszcie przeblagania gniewu Jehowy, który, według legiendy biblijnej, przy budowie wieży Babel ukarał pychę ludzką pomieszaniem języków. Legienda ta bądź co bądź świadczy wymownie, że ludzie już w tak odległych czasach odczuwali tak silnie potrzebę ogólnego środka porozumiewania się pomiędzy osobnikami, należącymi do różnych szczepów, iż brak jego tylko karą niebios wytłumaczyć sobie umieli.

Takim duchowym, od wieków u-
pragnionym łącznikiem staje się oto dzisiaj język Esperanto, a dzieła tego wielkiego dokonał czcigodny nasz jubilat, który przed dwudziestu dwu laty, tj. w r. 1887 wydał w Warszawie owoc swej długoletniej pracy w postaci skromnej broszurki, zatytułowanej: D-ra Esperanto, Język Międzynarodowy, Przedmowa i podręcznik kompletny. Pseudonim ten autora stał się, jak wiadomo, z czasem nazwą samego języka.

Broszurka z roku 1887, przedstawiająca na kilkunastu stronicach całą gramatykę i słownik Esperanta, była niejako ujęciem w formułę matematyczną języka międzynarodowego i dalszego jego rozwoju, niby ziarnem, z którego miało wyrość potężne drzewo, którego konary okalają dziś już całą ziemię.

Autor Esperanta należy do tych ludzi, którzy według słów naszego wielkiego Adama, już twórcami na świat przyszli, w których od dzieciństwa tliła się iskra boża gienjuszu. Myśl stworzenia języka międzynarodowego zabłysła samodzielnie w jego umyśle, gdy był jeszcze chłopięciem; zabrał się z zapalem do jej urzeczywistnienia i poświęcał jej każdą chwilę wolną od zajęć szkolnych,—całą swą młodość. Gdy

*) Że ułatwiona komunikacja, wspólność interesów zlać może nawet różne narzecza w jeden język literacki, wiemy z historii jęz. polskiego, niemieckiego i innych.

inni jego towarzysze, ciesząc się wiosną życia, nadmiar swych sił wyladowali w grach i zabawach, przyszły twórca Esperanta, nic nie wiedząc o swoich poprzednikach i ich pomysłach, myśl swoją w coraz to nowe wcielał kształty; a dziwnym zbiegiem okoliczności, nadawał jej nieomal w porządku chronologicznym te same kształty, które idea języka międzynarodowego w przeciągu trzechset lat przyjmowała w głowach setki jego poprzedników. Rekapitulował je niby naprędce, zanim swoje słowo własne wypowiedział, potwierdzając tym samym niejako prawo biogenetyczne Haeckla o rozwoju organizmów—w dziedzinie myśli.

Aczkolwiek pracę swoją uważał za wykończoną jeszcze przed opuszczeniem ławy szkolnej, nie spieszył się z jej ogłoszeniem, lecz trzymając ją lat dziewięć w ukryciu doskonalił swe dzieło bezustannie i wypróbowywał je praktycznie, tłumacząc przeróżne utwory na swój język.

Rok 1887, chwila ogłoszenia Esperanta, nie była naturalnie chwilą tryumfu języka. Los nie oszczędził naszemu Jubilatowi długich lat ciężkich walk moralnych i materialnych, bo takim już jest porządek świata, że każda wielka idea, zanim dozna powszechnego uznania, zwalczyć musi całe góry starych przesądów. Nikt też nie jest prorokiem w swej ojczyźnie. Tak więc i społeczeństwo polskie nie poparło, jako pierwsze, wielkiego dzieła swego rodaka. Przyznać jednak musimy, że przyjęcie w Polsce Esperanta, nieuznanego przez inne narody, kwestji języka międzynarodowego by nierozwiązywało. Nadto walka o zachowanie języka ojczystego wyczerpywała naszą energję i czyniła nas obojętniejszymi względem sprawy wszechludzkiej.

Nie rozumiejąc, że pomocniczy język międzynarodowy stać się musi najlepszym obrońcą przeciw wszelkiej zaborczości językowej, wielu lękało się, czy nie przybywa nam w Esperancie wróg języka ojczystego. Esperanto musiał więc wyemigrować z ziemi ojczystej, przebyć długą wędrówką całą kulę ziemską, zyskać wszędzie licznych zwo-

lenników, aby dopiero powrotną falą do nas zawitać. Nie mogę tu opowiadać ciekawej historii tej wędrówki i stopniowego rozpowszechniania się Esperanta na świecie, bo wymagało by to więcej czasu, niż go mam do rozporządzenia. Zaznaczę tylko, że idea języka międzynarodowego, dzięki olbrzymiemu ruchowi esperanckiemu na całym świecie, jest bliską ostatniego tryumfu. Powstają tysiące stowarzyszeń, klubów, agentur, biur informacyjnych we wszystkich krajach i częściach ziemi. Tak zwana Uniwersala Esperanta Asocio (Powszechny Z. Esp.) pozwala np. każdemu z członków za niespełna dwa złote rocznej składki zasięgać za pomocą korespondencji wszelkich informacji zawodowych z całego świata, a gdziekolwiek znajdzie się esperantysta na obczyźnie, otrzymuje w biurach Un. Esp. As. pomoc lub radę bezinteresowną. Że kupiectwo zagraniczne przekonało się już, ile ułatwień i korzyści praktycznych daje im Esperanto, świadczą wymownie ilustrowane cenniki esperanckie różnych fabryk, które teraz coraz częściej otrzymują z zagranicy nasi warszawscy kupcy i przemysłowcy.

Fala ta z zewnątrz zaczyna podmywać naszą obojętność. Jesteśmy jeszcze na szarym końcu, praca u nas idzie ciężko, ale patrzymy już na pewne rezultaty. Istniejące od dwóch lat nasze Polskie Towarzystwo Esperantystów zdołało w tym czasie otworzyć dwanaście filji na prowincji, a wydawana przy organie naszym „Pola Esperantisto” biblioteczka przekładów z języka polskiego, zaznajomiła świat esperancki z szeregiem arcydzieł Mickiewicza, Wyspiańskiego, Reymonta, Fredry, Sienkiewicza, po wydanych już poprzednio, przez firmy paryskie, niektórych poezjach Słowackiego, Konopnickiej, powieściach Prusa, Świętochowskiego, Orzeszkowej, Żeromskiego, Niemojewskiego i innych. W ogóle tłumacze polscy zaliczani są wprost do wzorowych, których inne narody starają się naśladować, a przekłady z języka polskiego stanowią w literaturze esperanckiej, z bogacającą się w coraz szybszym tempie, dział poważny, chętnie są czytane, niektóre do-

czekały się po kilka wydań i szerzą sławę imienia polskiego na całym świecie, i tam gdzie o nas chciano już zapomnieć, i tam gdzie nas jeszcze nie znano.

Tak to nasz Jubilat, stworzywszy wielkie dzieło wszechludzkie, nie tylko wślawił kraj swój rodzinny, nie tylko dał świadectwo jego gienjuszowi twórczemu, ale obdarzył nas zarazem narzędziem, za pomocą którego, w stokroć szerszej niż dotąd mierze, mamy możność zapoznawania całego świata z naszą narodową kulturą, indywidualnością i niespożytą żywotnością.

Kończąc ten pobieżny szkic, nie mogę nie dotknąć choć kilku słowy

szlachetnego uczucia, które przepelnia serce Jubilata i wraz z Esperantem wnika do serc jego zwolenników. To szlachetne uczucie, la nova sento, które on wieści, to braterstwo ludów, to uczucie miłości całej ludzkości, dążącej do coraz większej organicznej spójni—ludzkości, uczucie wielkie, jak gorąca miłość ojczyzny, jak czuła miłość rodzinna, które jednak obok siebie jedno serce ludzkie pomieścić jest zdolne.

Wyraz temu nowemu uczuciu dał Jubilat w swych pieśniach, które się stały hymnami Esperantystów, a z których jeden zadźwięczy tu za chwilę w nowej mowie.

Antoni Grabowski.

Por 50-a Naskotago de D-ro Zamenhof.

*Por majstro nia,
Por hom' genia,
Por bonfaranto de l' homar',
Por lia verko, Esperant', —
Nun sonas ĉie ama kant',
Konstruas sin l' estim'-altar'!...*

*Por hom' modesta
Ĉi tago festa
Kronetojn plektas el florar'...
En ravo krias tuta mond',
Esperantista ĉiu rond':
„Vivu amiko de l' homar'!”*

*Modesta estas la kronet',
Sed ĝin alportis granda kred'
Por la senmorta glor'-altar',
Por majstro nia,
Por hom' genia,
Por bonfaranto de l' homar'!*

*Dissendis semojn tra aer'
Cambridge, Genev', Boulogne sur Mer,
Dresdeno, Barcelon'!
Kaj kreskas nun en ĉiu land'
La laŭra arb' por Esperant', —
Por majstro estas kron'!*

*Por majstro nia,
Por hom' genia,
Eksonas jen kaj mia rim'...
Kaj flugas el dankema kor'
Tra esperanta mondo for...
La kant' de l' amo kaj estim'!*

Leo Belmont.



El rememoroj pri Esperanto 1887/1889.

Kara redaktoro! Vi petas, ke mi skribu por „Pol. Esper.“ miajn unuajn rememorojn pri Esperanto. Tre volonte mi servus al vi, sed bedaŭrinde en la nuna momento mi ne havas la eblecon pensi libere pri tiuj malproksimaj tempoj, ordigi la materialon kaj prilaborila temon, kiel ĝi meritas. Vi scias, kiel ĉiam pli laŭte krias al mi la pol-esperanta popolo: „Donu la finon de via vortaro“, ke mi eĉ timas eliri sur la straton ne povante kunpreni la kvaran kajeron*). Do pardonu, se mi prokrastos la skribadon de miaj rememoroj ĝis pli favoraj cirkonstancoj.

Hodiaŭ mi donos al vi nur tion, kio mem, senorde, elfluos el sub mia plumo, por montri al vi almenaŭ mian bonan volonton.

Pri lingvo internacia mi komencis okupi min ĉirkaŭ unu jaro antaŭ la apero de Esperanto. Tiam Volapük atingis la zeniton de sia famo kaj disvastiĝo. Ĉar mi sciis suĝiĉe da lingvoj, mi ne sentis la bezonon de tia kompreniĝilo, sed la ideo mem ekplaĉis al mi, kaj mi komencis studi Volapükon, por resti fidela al la principo: „Homo sum, nihil humani a me alienum puto“.

Kvankam mi havis sufiĉan kapablon por lingvoj, mi baldaŭ konvinkiĝis, ke ne estas facile fariĝi lerta volapükisto. Por ekaŭdi, kiel sonas la lingvo en buŝa uzado, mi faris vojaĝon kaj vizitis eminentajn volapükistojn, tamen mi ne atingis mian celon. La sinjoroj redaktoroj sciis skribi volapüke, ne formetante la vortaron el la manoj, sed ili ne sciis paroli la tro malfacilan lingvon. La ĉefa kaŭzo de ĝia pereco estis do ne la apero de Esperanto, sed la cirkonstanco, ke Volapük neniam fariĝis kaj ne povis fariĝi lingvo viva, flue parolata.

En somero de l' jaro 1887, veninte el Norda Bohemujo, mi vizitis miajn parencojn en Prusujo kaj tiam en Toruna pola librejo oni montris al mi la ĵus

aperintan unuan lernolibron de D-ro Esperanto. Mi aĉetis ĝin, kaj reveninte hejmen, tuj komencis ĝin studi kaj estis ravita de la simpleco, logikeco kaj bonsoneco de la nova lingvo. Post kelkfoja tralego de la 3 versaĵoj „Mia penso“, „El Heine“ kaj „Ho mia kor“, mi sciis ilin deklami parkere kaj sentis, ke mi fariĝis fervora ano de la „lingvo internacia“ (mi ne diras Esperantisto, ĉar tiu vorto tiam ankoraŭ ne ekzistis). Post kelkfoja tralego de la 16 fundamentaj reguloj kaj de la 900 radikoj, kiujn mi konis el aliaj lingvoj, mi sciis la tutan lingvon kaj mi skribis jam en la lingvo internacia, sub adreso de D-ro L. Zamenhof al D-ro Esperanto, leteron, en kiu mi gratulis la aŭtoron, esprimis mian profundan kredon je la venko de lia verko, kaj aniĝante „senkondiĉe“ promesis kunlabori en la disvastigado de la mirinda bela kaj facila lingvo. Mi ricevis baldaŭ ĝentilan respondon de la aŭtoro, kiu konfesis al mi sian veran nomon, kaj de nun komenciĝis mia viva korespondado kun la majstro, kiu ĝojigadis min per adresoj de la unuaj diverslandaj adeptoj de la „lingvo internacia“.

Senprokraste post la aniĝo al Esperanto mi sciigis ankaŭ la Vienan volapükan klubon, kies membro mi estis, pri la naskiĝo de la vera „lingvo internacia“, kaj donis al la eks-samideanoj la ĝentilan konsilon, ke ili ne foruzu vane paperon, inkon kaj tempon por sia volapüko, kiu neniam viviĝos, neniam fariĝos lingvo tutmonda. Mi memoras la komencon de la ricevita respondo: Söl palestimöl! Posdunön volapüki binom fikulik (Estimata sinjoro! Imiti la mondlingvon estas facile). La ceteraĵon mi forgesis.

Esperanton mi ekkonis ĝuste en la tempo, kiam, forlasinte mian okupon en Bohemujo, mi devis lerni la lingvon rusan, kiun mi antaŭe ne konis sufiĉe, por akcepti oficon de fabrika direktoro en centra Rusujo. La aŭtoro de mia rusa lernolibro, A. Boltz, instruan- te la lingvon laŭ la metodo de Robert-

*) La kvara kaj lasta kajero, ĉirkaŭ 10 folioj, estas en presado kaj aperos post 1 monato.

son, uzas por la ekzercoj la novelon de Puŝkin „Neĝa blovado“. Lernante parkere la noveleton ruse, mi ĝin samtempe tradukadis en Esperanton. Mi aplikadis la 15-an § de nia Fundamento kaj kuraĝe forĝis la necesajn vortojn el la 900 radikoj, ne sciante, ĉu miaj derivaĵoj eniros iam en komunan uzadon. Preskaŭ ĉiuj ili vivas ĝis hodiaŭ, nur kelkaj kiel „pikradetoj, atendema“ k. t. p. estis poste elpuŝitaj de novaj radikoj (spronoj, pacienca..., kiujn aldonis D-ro Zamenhof poste en sia Vortaro). Ĉar modeloj por diversaj parolturnoj tute ne ekzistis, mi formis la frazojn, penante, ke ili estu kompreneblaj dank' al sia logikeco aŭ internacieco. Se mi trovis, ke tiel same esprimas sian penson la slavaj, germanaj kaj romanaj popoloj, mi uzis la parolmanieron en la frazo kiel internacian, ne konsiderante tion, ke ĝi ne estas eble tute logika. Tia frazo estas ekzemple „Mi kalkulas sur vin“ en la Kondukanto.

Tiamaniere naskiĝis la Neĝa Blovado, el lingvo rusa, — Gefratoj, el germana, — Fragmento el Mizeruloj, el lingvo franca (ne presita perdiĝis), — Janko-Muzikanto kaj Nova Jaro el lingvo pola — kaj la pecetoj en la unua Kondukanto, en kiu mi donis tradukojn el kelkaj aliaj lingvoj, por apliki la novan lingvon al tradukado el plej diversaj idiomoj kaj montri la vojon al diversnacionoj. Hodiaŭ mi rigardas fiere tiujn unuajn paĝojn de nia tiel bele disvolviĝanta literaturo Esperanto.

Sed ĉu mi povas priskribi mian ĝojon kaj kortuŝon, kiam mi, dum tiuj laboroj, ricevis en la jaro 1888 la unuan libron en Esperanto, verkitan de D-ro Zamenhof mem „la Duan Libron“, kaj en ĝi la unuan lian literaturan verketon, fabelon el Andersen, s. t. „La Ombro“. Ĝi estis mia plej bona konsilanto. Sciante ĝin baldaŭ preskaŭ parkere, kaj kompreninte la spiriton de la lingvo, mi havis ĉion, kion mi bezonis. Mi laboris fervore, ne atendante pli plenan vortaron, kiun dume la majstro preparadis.

Ĝoja estis ankaŭ kaj ne forgesbla por mi la tago, kiam en 1888, veninte

Varsovion, mi vizitis nian Majstron. Tiam, kiel al mi memorigas D-ro Ludwik Zamenhof, inter ni ambaŭ eksonis la plej unua interparolado esperanta. Ambaŭ ni parolis la lingvon la nunan fojon kaj tamen la lingvo ekfluis vigle, ĉar ĝi estis jam antaŭe viva en niaj koroj kaj mensoj. De nun mi estis feliĉa koni kaj ŝati ne nur la lingvon, sed ankaŭ ĝian genian aŭtoron, homon amindan, simplan, sinceran kaj modestan.

Kaj la unua propagando? Mi ĝin faris fervore kaj ne tute senefike. Tamen ĝi estis terure malfacila afero! Kiamaniere gajni adepton por lingvo, kiu estas parolata de kelke da personoj, disĵetitaj en la tuta mondo? — Utopio! — Ne, pri tio pli bone mi ne parolos. Pli agrabla estis la korespondado kun la samideanoj.

Al la unuaj plej lertaj Esperantistoj apartenis sendube Edgard v. Wahl, kun kiu mi ofte korespondadis. Wahl, tradukinto de Princino Mary, skribis tiel korekte kaj flue, ke eĉ hodiaŭ li ne povus pli bone. Aliaj unuaj Esperantistoj ne-slavaj, devis atendi pli vastajn gramatikojn kaj vortarojn aŭ prepari ilin mem laŭ la ekzistanta literatura materialo por tute perfektigi en la lingvo. Nur por la poliglotaĵoj la 16 reguloj kaj 900 sufiksoj estis tute sufiĉaj. Al pli bone skribantaj ne-slavoj apartenis en la unuaj 3 jaroj Einstein, Marignoni, Geoghegan, Demonget, kvankam malfacile estis por ili tute demeti de si la nacilingvajn kutimojn.

Tamen la afero iris malrapide antaŭen. En Septembro 1889 granda ĝojo inter nia popolo. Aperas la unua numero de la Nurnberga „La Esperantisto“!

Samtempe kun la apero de la unua gazeto komenciĝas jam la skribita historio de nia movado. Do mi uzas la okazon por interrompi tiun ĉi improvizitan, rapideme skribitan mian rememoron.

* * *

Sed vi, kara redaktoro, demandas min ankoraŭ pri niaj unuaj polaj pioniroj:

Pri la esperantiĝo de nia talenta amiko Leo Belmont mi longe nenion sci-

is, ĉar lia pola scienca artikolo en Ateneum pri Esperanto aperis subskribita per pseŭdonimaj literoj. Nur en 1892, kolektante la materialon por mia Liro de Esperantistoj, mi eksciis de D-ro Zamenhof, ke la tradukinto de la versaĵeto el Heine en la Dua Libro estis Leo Belmont; kaj nur tiam komenciĝis nia interkoniĝo kaj pli viva korespondado.

El la unuaj polaj Esperantistoj mi memoras bone la kleran, fervoran amikon de Esperanto, Jan Janowski (Esperantisto № 377 el jaro 1888), kies verkon oni povas legi en la Fundamenta Krestomatio, kaj la neforgeseblan, amindan, bone konatan al la Esperantistaro, Józef Waśniewski (Esp. 2572 el jaro 1893). Kun ambaŭ mi estis en viva korespondado kaj vizitis ilin en Varsovio. Ambaŭ amikojn forŝiris de mi tro baldaŭ la morto. La nelacigeblan propagandiston en la pola gazetaro, S-ron A. B. Brzostowski, kiu apartenis ankaŭ al la plej unuaj pioniroj, mi ekkonis multe pli malfrue, ekloĝinte konstante en Varsovio. Same estas kun nia pol-esperanta historiisto kaj statistikisto S-ro Adam Zakrzewski, kiu okupante sin pri lingvo internacia de l' jaro 1887, nur dum

la Bulonja Kongreso fariĝis konvinkita Esperantisto kaj unu el la apogoj de nia pola ĵurnalo. Al la unuaj polaj pioniroj apartenis ankaŭ la nuna energia sekretario de la Tutmonda Esperanta Kuracista Asocio (Teko), D-ro Róbin, kiu jam en la jaroj 1891—3 fervore propagandis nian lingvon kaj apartenis al la unua pola neoficiala rondeto (kune kun D-ro Aleksander Blumental, Janowski, Waśniewski, Stanisław Goldberg kaj D-ro Nauman, unu el niaj unuaj talentaj poetoj), sed mi, loĝante longan tempon en centra Rusujo (Ivanovo-Vozniesensk), ekkonis lin, reveninte Varsovion, ĉe la fondado de nia varsovia societo. Same estis kun nia eminenta esperanta verkisto D-ro K. Bein, kiu komencis labori por Esperanto cirkaŭ la jaro 1903, kaj kun kiu mi interkoniĝis ankaŭ en Varsovio. Sed mi ne pri-skribas la tutan unuan esperantan movadon en Polujo, do pardonu amikoj, se mi, rapidante, preterlasis ian meritoplenan nomon, kiu transiris en la historion.

Tute via
A. Grabowski.

Wszechświatowy Związek Artystów.

Z zadowoleniem możemy zaznaczyć nowy ważny krok naprzód w naszej sprawie:

Przed kilku tygodniami został powołany do życia nowy wszechświatowy związek esperantystów: „Międzynarodowa Liga artystów“.

Artyści, których powołanie bardzo często zmusza do podróży i obcowania z ludźmi innych narodowości, najlepiej wiedzą, jaką poważną przeszkodą jest w ich stosunkach zawodowych brak wspólnego języka. Szczególnie daje się to odczuwać aktorom trup wędrujących oraz artystom objeżdżającym z gościnnymi występami niemal całą kulę ziemską. Ile trudności napotyka się w takich razach na każdym kroku bądź to przy zawieraniu umowy z dyrektorami, bądź to w stosunkach z reżyserami, prze-

konał się z osobistego doświadczenia nie jeden artysta. Z tego też powodu zdarzają się nieraz poważne nieporozumienia wynikające z braku dokładnych i jasnych dla obu stron układów.

To też artyści różnych krajów od dłuższego czasu próbowali połączyć się w jedno ciało dla łatwiejszego prowadzenia wspólnych spraw. Na przeszkodzie jednak stał im brak wspólnego dla wszystkich jednakowo zrozumiałego języka.

Bracia Karol i Kamil Schwartz wzorując się na wielu innych międzynarodowych związkach zawodowych, które przyjęły już dla swoich stosunków Esperanto, spróbowali założyć ligę artystów, za pomocą tego języka. Pomysł i próba okazały się wkrótce bardzo szczęśliwymi, gdyż na zaproszenie projektodawców odezwało się przychylnie mnóstwo artystów z różnych krańców

ŝwiata. Do ligi zgłosili się nie tylko aktorzy, lecz również dyrektorzy, przedsiębiorcy oraz reżyserowie różnych scen. Wszyscy odrazu pojęli całą doniosłość takiego zawodowego związku, posługującego się wspólnym, dla wszystkich jednakowo zrozumiałym językiem. Celem tego związku jest ułatwienie porozumienia się między artystami z jednej strony i dyrektorami oraz przedsiębiorcami z drugiej. W języku Esperanto będą więc spisywane umowy i dostarczane wszystkie niezbędne dla obu stron wiadomości.

Aby projekt został jak najprędzej wprowadzony w czyn, bracia Schwartz zaczęli już ogłaszać kursy języka Esperanto w swoim związkowym oficjalnym organie: „Program“. Główna siedziba ligi obecnie znajduje się w Brombergu (Bydgoszczy) przy ul. Neuer Markt 8.

Możemy już dzisiaj zaznaczyć, że dzięki energicznej akcji założycieli tego nowego związku, na niektórych scenach zaczął już rozbrzmiewać nasz język. Oto np. od pewnego czasu w znanym paryskim teatrze „Folies Bergères“ bracia Schwartz dzielnie popierają naszą sprawę swojemi świetnemi parodjami, zachęcając w nader dowcipny i zajmujący sposób różnokrajowych bywalców tego teatru do studjowania Esperanta. Skutek tej nieco oryginalnej propagandy, jak nas zapewniają, jest znakomity; zaczynają się interesować naszym językiem nie tylko ci, którzy mało co o nim dotychczas słyszeli, lecz także i ci, którzy kpili sobie z poważnych artykułów o Esperancie. Okazuje się że wielu ludziom do przekonania łatwiej przemawia lekki żarcik, niż poważny argument naukowy.



Interŝlava Esperantista Kongreso.

En la lasta tempo nia redakcio ricevis kelkajn leterojn el Bohemujo kaj Galicio ĝustigantaj la sciigojn presitajn en „P. E.“ en la pasinta jaro. Ĉar estas neeble publikigi ĉiujn leterojn, kiuj ofte estas tro longaj kaj kelkfoje skribitaj en iom tro akra tono koncerne la partiojn regantajn en Bohemujo kaj krom tio kelkaj el ili estis tute privataj, ni decidis doni ĉi tie nur rezumon de ili.

1) La sciigoj, kiujn ni ricevis pri la kvazaŭa interkonsento de poloj kaj bohemoj okazinta en Krakovo—estis nur rezultato de privata intima interparolado inter s-ro Barvir kaj kelkaj krakovaj esperantistoj.

2) La krakovaj samideanoj ne decidis ankoraŭ, ke Krakovo estas ne taŭga por Interŝlava Kongreso — ili nur ne postulas, ke tiu ĉi kongreso okazu nepre en Krakovo, kaj Krakovanoj volonte aliĝos al la kongreso en Praha, se nur malaperos malkonsento inter ambaŭ Bohemaj Unioj.

En tiu ĉi proksimume senco estis ankoraŭ publikigita artikolo en la De-

cembra № de „P. E.“: Hodiaŭ ni povas nur aldoni, ke ĉi por ni varsovianoj estus efektive tre dezirinda interkonsento de ambaŭ partioj, sed ne speciale je la vidpunkto de iliaj privataj rilatoj, ĉar ni ne povas kaj ne havas rajton enmiksi nin en ilian internan vivon—tiu ĉi afero estas tute privata kaj ni esperas, ke pli aŭ malpli frue tiu ĉi paciĝo alvenos ne sub deviga postulo, sed sur fundamento de amika interkompreniĝo. Se ni petas hodiaŭ, ke la ambaŭ partioj forgesu siajn internajn malpacojn, ni faras tion por komuna bono de ĉiuj slavoj, por kiuj la sukceso de la unua slava kongreso estas tre kara.

Por tiu ĉi celo Ĉeĥoj devas nepre kuniĝi kaj ni ne dubas, ke tiu ĉi kuniĝo de fortoj okazos efektive. La tempo estas malfrua kaj ni perdus nur nian energion en tute sencelaj disputadoj.

Ĉi sube ni aldonas eltiraĵon el la letero, kiun ni ricevis de „Bohema Asocio Esperantista“, por doni al la ambaŭ partioj en Bohemujo eblon esprimi ilian postenon en la interesanta nin afero.

El tiu ĉi letero ni vidas, ke „Bohema Asocio Esperantista” volonte oferas siajn fortojn kaj rimedojn por komuna laboro:

„La artikolo publikigita en la № 4 de la „Revuo” sub la titolo „Peto de Centra Asocio, Bohema Unio Esperantista” estas taŭga elvoki eksterlande malĝustan opinion pri la esperantista movado en Bohemujo, kaj tiuokaze ni aldonas al ĝi jenan klarigon:

En Bohemujo ekzistas nun du centroj esperantistaj: Bohema Asocio Esperantista por kluboj kaj individuoj, kaj Bohema Unio Esperantista, sole por kluboj, — kaj ambaŭ kunigas preskaŭ la saman nombron da bohemaj esperantistoj. Por ĉiu lojala homo estas klare, ke ĉiu el tiuj ĉi du organizacioj estas rajtigita fari kiajn ajn deklarojn sole en sia propra nomo, sed neniel en la nomo de ĉiuj bohemaj esperantistoj.

Sed ĉar tiu ĉi memevidenta cirkonstanco ne malhelpas la Boheman Union Esperantistan proklami Union, kiel solan reprezentanton de bohemaj esperantistoj, ni — Bohema Asocio Esperantista — estas devigataj rimarkigi ĉiujn esperantistojn, ke Bohema Unio Esperantista absolute ne havas rajton sola reprezenti la boheman esperantistaron, nek en Bohemujo, nek eksterlande.

Ni tre bedaŭras, ke en la bohema esperanta mondo ekzistas homoj, kiuj opinias, ke estas eble, la ekzistadon de tia organizacio, kia estas Bohema Asocio Esperantista, al kiu cetere apartenas la plej bonaj bohemaj esperantistoj kaj verkistoj, fordisputi per gazetaj artikoloj kaj modestaj laŭdkantoj pri la „plej potence disvolvita kaj modele organizita” Unio.

Pro tio ni petas la esperantistaron ekster Bohemujo, akcepti nian klarigan kiel informan precipe okaze de aranĝota interslava kongreso, kiun alislavaj esperantistoj, se ĝi okazus en Praha, prave volas havi aranĝotan de ambaŭ centraj organizacioj bohemaj.

Bohema Asocio Esperantista

Praha II — 1036.

En tiu ĉi sama afero ni ricevis la sekvantan leteron de la Lvova Societo:

„Karaj samideanoj!

Respondante Vian cirkuleron de la 10 XI 1909 N. E. 4706/09 ni havas la honoron komuniki al Vi, ke la Estraro de nia Societo unuanime decidis danke akcepti Vian proponon koncerne la aranĝon de Interslava Kongreso Esperantista en Bohemujo, sed nur kondiĉe, ke ekregos plena interkonsento kaj paco inter ĉiuj Bohemaj Esperantistoj.

Saman opinion ni esprimis al s-ro Barvir, intertraktante kun li pri tiu demando, samajn niajn dezirojn ni aludis ankaŭ en nia saluta letero sendita al la malfermo de la I Bohema Kongreso Esperantista.

Starigante tiun ĉi „conditio sine qua non” de nia aprobo, ni neniel pretendas senrajte nin enmiksi en Viajn internajn aferojn aŭ preni sur nin la rolon de juĝantoj pri tio, kiu partio estas kulpa je la bedaŭrinda disiĝo inter la Bohema samideanaro. Depost la malsukcesinta provo dum la slava kunsido en Dreseno ni silentis ja, kiel longe Via agado etendiĝadis nur inter la limoj de Via propra lando. Sed nun, kiam Vi estas ĉirkaŭprenontaj per Viaj fortaj brakoj la tutan Slavaron esperantistan, kiam Vi estas farontaj al Vi mem kaj al ceteraj Slavoj la honoron, por organizi en Via lando la unuan slavan manifestacion esperantan, ni konsideras nin, kiel Slavoj kaj Esperantistoj, plene rajfigitaj en nomo de nia sankta afero apelacii al Vi, por ke Vi, tiel bravegaj „pacaj” batalantoj por la ideo interfratigonta la tutan homaron, antaŭ ĉio interfratiĝu kun Viaj proprenaciaj samideanoj kaj ĉesigu la internan malpacon, danĝeran por nia movado kaj ofendantan la moralan senton de tuta popolo esperantista. Tio ĉi estos laŭ nia opinio la plej bona komenco de Via organiza laboro por la venonta Kongreso kaj sciante, ke la motivoj de la malkonsento ne estas principaj, lingvaj, sed pli vere taktikaj, ni estas certaj, ke ĉe sincera volonto je ambaŭ flankoj la vojo al la repaciĝo estos facile trovebla.

Pardonu, karaj Samideanoj, nian eble troan malkaŝemon aŭ eĉ trudemon, sed ni konsideras kiel nian devon uzi ĉiujn eblajn rimedojn por atingi nian celon kaj ankaŭ pravigi nian eventualan konduton, se pro la neokazonta unuiĝo de Bohemaj Esperantistoj ni est-

us—je nia plej granda bedaŭro—devigataj ne aliĝi al Via entrepreno.

Esperante tamen, ke por nia komuna bono nia alvoko estos efika, ni restas kun plena respekto kaj samideanaj salutoj

Viaj
Societo „Esperanto” Lvovo.

Jak się u nas zwalcza Esperantyzm.

Nie ludzili się esperantyści, a tym mniej twórca Esperanta, by urzeczywistnienie tak doniosłego dla ludzkości zadania, jak wprowadzenie w użycie łatwego, międzynarodowego, pomocniczego języka, mogło się obyć bez ciężkich, długotrwałych walk przeciw reakcji, uprzedzeniom i egoizmowi ludzkiemu z jednej strony, przeciw obojętności lub wiary w niemożliwość „sztucznego języka” z drugiej.

I kunsztowna dzisiejsza lokomotywa nie narodziła się jednego ślicznego poranku; i tu konserwatyzm i uprzedzenie ludzkie starały się stawiać zapory, póki się nie przekonano, że wygodniej jest „sztucznie” jeździć, niż „naturalnie” chodzić. Zeppelin przed dziesięciu laty był dla wielu bardzo „mądrych” ludzi tylko fantazją; dzisiaj ciż sami mędracy wolą nie powtarzać swych dawnych, stanowczych sądów.

Esperantyzm nie unika krytyki; owszem szuka i życzy jej sobie, w przekonaniu, że mu rzeczowa krytyka tylko korzyść przynieść może i że z niej w końcu zwycięsko wyjść zdoła, bo prędzej lub później wobec faktów i logiki każde uprzedzenie ustąpić musi.

Jeden tylko konieczny warunek esperantyści stawiają — by krytyk znał dobrze przedmiot, o którym chce mówić. Czy nie należy żądać od tych, którzy nas chcą informować o chińskim lub japońskim języku, by najpierw sami je poznali, by mieli wyobrażenie o literaturze, mówiących temi językami?

Sądzę, że tu dwóch zdań być nie może.

Jak się jednak dzieje z Esperantem?

Proszę zapytać tego lub owego domorosłego krytyka esperantyzmu, czy

się uczył Esperanta, gdzie się zapoznał z esperantystami, jakie dzieła i pisma zna? W większości wypadków zrobimy zdumiewające odkrycie. Krytyk, który się jeszcze umie rumienić, zarumieni się i będzie się jękał w tem lub owem, inny zaś z wszelką stanowczością powie, że szkoda czasu na uczenie się takiego międzynarodowego żargonu, tymbardziej, iż z tych a tych teoretycznych względów jest przekonany, że to nic nie warte i że ludzkość nigdy takiego warjackiego pomysłu nie zaakceptuje; a już największym atutem będzie, że Volapük upadł. Tylko, broń Boże, nie pytaj takiego krytyka na czym się zasadza różnica między Volapükem a Esperantem! To dla niego zupełnie—terra incognita. Prędzej się zorientuj, jaka jest różnica między balonem Montgolfiera a Zeppelinem.

To jest stanowisko, jakie olbrzymia większość przeciwników Esperanta zajmuje.

Wygodne ono może być, bo nie wymaga umysłowej pracy; wystarczą oklepane frazesy. Lecz, czy takie krytyki mogą być miarodajne?

Gorzej jeszcze, że niektóre dzienniki nie wahają się tak płytkimi krytykami wprowadzać w błąd swoich czytelników.

Półtora, mniej więcej, roku temu czytałem w feljtonie jednego z większych dzienników warszawskich dowodzenia o bezsensowności Esperanta, zakończone wyznaniem autora, że otrzymany od znajomego elementarz esperancki, schował go nieprzeczytany głęboko do swej biblioteczki w przekonaniu, że takie rzeczy czytać—szkoda czasu. Niedawno zaś zaszczylił tenże sam feljtonista w tymże samym piś-

mie surową krytyką Esperanto, zaznaczając, że, kto w Polsce szerzy Esperanto, winien być, jako wróg narodu, a przynajmniej, jako warjat, uważany.

Co z takiego twierdzenia wnosić można? To, że ów pan feljetonista, pisząc o Esperancie, nie tylko niema wyobrażenia o języku esperanckim, lecz nie zna tendencji i przewodniej myśli esperantyzmu, inaczej musiałby wiedzieć, że esperantyzm dąży z jednej strony przez zastąpienie obcych języków Esperantem do umożliwienia głębszych studiów ojczystego języka, z drugiej strony do łatwiejszego zapoznania się przez Esperanto z duchowemi zdobyczami innych narodów, to znaczy, do podniesienia umysłowego poziomu własnego narodu. Dla Polaka zaś ma Esperanto jeszcze to znaczenie, jakiego w takim stopniu dla Anglika, Francuza, Niemca mieć nie może, mianowicie: otwiera cywilizowanym narodom oczy na całe bogactwo literatury i ducha polskiego przez tłumaczenie wybitnych autorów na przystępny wszystkim narodom język esperancki, a tym samym przekonywa o żywotności naszego narodu.

Dotychczas przetłumaczono tylko mniejsze utwory (z wyjątkiem „Faraona” Prusa), Mickiewicza, Słowackiego, Krasińskiego, Orzeszkowej, Sienkiewicza, Wyspiańskiego, Reymonta itd. a już te utwory wzbudziły prawdziwy podziw u esperantystów Anglików, Francuzów, Niemców, Hiszpanów itd. Stanowisko zaś, jakie pewien naród zdoła zająć wobec duchowego rozwoju ludzkości, nie jest bezwartościowym mamiłem, lecz realnym czynnikiem w życiu narodów.

Ruch umysłowy, który, jak esperancki w przeciągu krótkiego czasu, spowodował utworzenie 1500 z górą towarzystw na całej kuli ziemskiej, który przyciągnął inteligencję i wiele najwybitniejszych sił naukowych wszystkich cywilizowanych narodów, wielu profesorów uniwersytetów i członków akademii,—musi mieć chyba cokolwiek głębsze podstawy, niż się to temu lub owe-

mu naiwnemu feljetoniście zdawać może. Jedno tylko międzynarodowe stowarzyszenie lekarzy esperantystów liczy dzisiaj, w półtora roku od założenia, już przeszło 1000 członków. Wszakże i to ludzie, którzy pokonczyli uniwersytety,—czyż i ci nie wiedzą, czego chcą? Czy i ci kwalifikują się według wyroku dziennikarzy, nie mających wyobrażenia o Esperancie, do domu warjatów?

Czy człowiek, jak twórca Esperanta, który zdołał taki ruch wywołać, który z poświęceniem swych sił duchowych i materialnych, trzydzieści kilka lat bezinteresownie pracuje nad urzeczywistnieniem tak ważnego dla ludzkości zadania—nie zasłużył sobie na taki szacunek i uznanie przynajmniej, by krytyk, nim się odezwie, miasto rzucać frazesy, zaznajomił się gruntownie z wynikami tej olbrzymiej pracy?

Przejrzyjmy dzieje cywilizacji ludzkości, a przekonamy się, że postęp i rozwój umysłowy i materialny ludzkości nie tym zawdzięcza, którzy, kierując się osobistym egoizmem, wygodnie oczekują póki z wysiłku i pracy umysłowej innych nie będą mogli korzyść wyciągnąć, lecz tym idealistom, często wyśmiewanym, zawdzięcza, którzy bez względu na materialne ofiary, parci li tylko wewnętrzną siłą natchnienia duchowego, niezmordowanie dążyli do zamierzonego celu, będąc pewni, że owoce ich pracy nie oni, lecz dalsze pokolenia dopiero zbierać będą.

Do tego rodzaju pracowników należy dziś jeszcze dziesiątki tysięcy esperantystów zaliczyć; a idealizm ich, wobec sobkostwa krótkowidzących rutynistów lub wygodnych kalkulatorów, zasługuje przynajmniej na to, by podejmujący się krytyki zapoznali się dokładnie ze sprawą, której przeprowadzenie przyszłe pokolenia za największe dobrodzieństwo, za największą może reformę dwudziestego wieku uważać będą.

R. Maske.

Drezno.

VI-a Internacia Esperantista Kongreso.

Bela Vaŝington, la nunjara ĉefurbo de Esperantujo, jam komencas senti, ke estas venonta al ĝi io pli ol ordinare interesa kaj grava. La Sesa Internacia Kongreso de Esperantistoj, okazonta dum la tria semajno de Aŭgusto 1910, promesas esti la plej rimarkinda kunveno iam okazinta en la kunvena urbo, superanta ĉiujn aliajn en entuziasmo kaj internacieco. Komprenible la Esperantistoj de Vaŝington jam scias tion, kaj rapide pligrandiĝanta nombro da Vaŝingtonanoj enviciĝas en la movadon.

La nacia sekretario, S-ro Reed, kiu estas nelacigebla laboranto, jam transloĝiĝis el Chicago al Vaŝington, kaj havas grandan kaj belan oficejon en la Komerca Ĉambro, ĉe la kruciĝo de stratoj F kaj Dekdua, en la koro de la komerca kvartalo de la urbo.

La fama kongreso en Cambridge estis administrata de grupeto nomita la Trio por la Tria. Ĝis nun oni povus nomi la plej agemajn laborantojn tie ĉi la Seso por la Sesa, enkalkulante S-ron William F. Gude, prezidanton de la Komerca Ĉambro, Sekretarion Reed, Doktoron Kellerman, Prof. W. J. Spillman, S-ron I. C. Evans kaj Konsilanton Cheney.

Tre sukcesplena Esperanta kunveno okazis en Annapolis, ŝtato Maryland, apud Vaŝington, kie troviĝas la nacia lernejo por maraj militistoj. Ĝi estis kondukata de Konsilanto Cheney, helpata de S-roj Reed kaj Spillman. Du horoj da parolado vekis inter la aŭdintaro entuziasmon, kiu materialigis en la organizo de loka klubo por la studado de la lingvo. Inter la aŭdintaro estis unu pastro, kiu esprimis deziron lerni la lingvon por ke li povu konduki la ekleziajn ceremoniojn fariĝontajn en Esperanto la 14-an de Aŭgusto 1910.

Por la unuiĝo de la kelkaj esperantistaj kluboj en Vaŝington oni fondis la Federacion de la Distrikto de Kolumbio (la nacia urbo havas por si mem malgrandan distrikton ekster ĉiu ŝtata

kontrolo). La prezidanto de la Federacio estas S-ro William F. Gude, kiu, kiel ĉefo de la Komerca Ĉambro, estas la plej okupata homo en la urbo escepte nur la nacia prezidanto. La vicprezidantoj de la Federacio estas S-ro Charles W. Russel, vic-advokato ĝenerala de Usono, kaj D-ro Irwin Smith, konata scienculo el la Registara Fako de Terkulturo. La sekretario estas S-ro I. C. I. Evans, el la sama sekcio de la registaro.

Oni povas gratuli la eŭropajn samideanojn pro la eblecoj de ilia veturado al la Sesa kaj revene. Oni nun konsideras du planojn. Unue, preni vaporŝipon kiu ekvojaĝos el Amsterdam kaj, „tuŝante” Southampton kaj aŭ Cherbourg aŭ Boulogne-sur-Mer, iros al Quebec aŭ Montreal, prezentante al la pasaĝeroj la grandajn belecojn de la rivero Sankta Laŭrenco kaj eble mallongan veturon per la rivero Saguenay, konata por la plej grandiozaj vidindaĵoj de la mondo; dum de Montreal oni veturos ĝis la Akvofaloj de Niagaro kaj de tie al Vaŝington, revenante tra Filadelfio, Nov-Jorko kaj Bostono.

La dua plano estas veni per pli suda vojo trans la oceanon kaj iri rekte al Vaŝington per riveroj Norfolk kaj Potomac, kaj ekvojaĝi hejmen aŭ de Nov-Jorko aŭ Bostono. Ĉiu el la du planoj, iom ŝanĝita, donus tre belan vojaĝon por la eŭropaj vizitantoj.

La Esperantista Societo de Vaŝington, nun en la tria jaro de sia vivo, estas feliĉa, havante, kiel prezidanton Prof. W. J. Spillman, kiu estas ankaŭ la ĉefo de du grandaj grupoj de Esperantistoj en la Registara Fako de Terkulturo. Prof. Spillman estas la plej elokventa el niaj lokaj paroladistoj pro sia longa sperto kiel lekciisto. Li ĵus ricevis la permeson de la Direkcio de Publikaj Lernejoj por la uzado de kelkaj lernejoj ĉambroj por la instruado de Esperanto en noktaj kursoj.

La Esperantista Societo de Vaŝington donis publikan elmontradon de Esperanto la vesperon de la 30-a de No-

vembro, en la kunvenejo de la Kristana Unuiĝo por Junaj Viroj, prezentante bone faritan programon, kun iom da bona muziko. La esperanta parto de la programo estis sekvata de parolado farita en angla lingvo de Prof. Reed, pri la Barcelona Kongreso. La societo donis alian publikan feston la 15-an de Decembro, honorantan la kvindekan naskotagon de D-ro Zamenhof.

En amikema letero ĵus ricevita de S-ro John Barrett, Direktoro de la Internacia Oficejo de Amerikaj Respublikoj, li diras: „Se mi povas ion fari por helpi la preparadon de la Sesa Internacia Kongreso de Esperantistoj, mi tion faros kun plezuro.” El tio, io grava eble venos.

Jas. W. Cheney.

Laŭ „Amerika Esperantisto”.



Pri esperantista fonda Kapitalo.

La demando, kiamaniere fondi kapitalon por subteni niajn centrajn oficejojn kaj sisteman propagandon de Esperanto en la mondo ĝis nun restas ne solvita. Kiel mi scias, tiu ĉi demando estis multfoje diskutita kaj naskis nur diversajn projektojn kiuj ĝis hodiaŭ restas bedaŭrinde nur projektoj. Kaj tamen laŭ mia profunda konvinko nia afero ne povas progresi regule sen materiala apogo. Se ni enrigardos en la vivon de ĉiuj pli grandaj societoj, ni facile konvinkiĝos, ke nur tiuj el ili havas certan ekzistadon, kiuj havas fandan kapitalon. Tiu ĉi kondiĉo estas tiel evidente necesa, ke estas tute superflue verki por ĝi grandajn argumentitajn artikolojn. Se mi ektuŝis ĝian necesecon en tiu ĉi artikolo, mi faris nur speciale por rememorigi ankoraŭ unu fojon al ĉiuj esperantistoj ke estas jam tempo realigi almenaŭ unu projekton kondukantan al tiu ĉi celo.

Ĝis nun niaj centraj organizacioj pasigas efemeran ekzistadon, kiu apogis sin nur sur okaza subteno de kelkaj personoj. Ni scias tre bone, kiel malforta kaj nesufiĉa estas tia subteno. Kaj nia afero marŝante antaŭen ĉiam pli bezonas tiun konstantan fonton, el kiu ĝi povus ĉerpi siajn vivrimedojn.

El nia longa sperto ni scias bone, ke nur en tiuj landoj rapide kaj facile progresas nia afero, kie troviĝas kelkaj homoj, kiuj oferas por ĝia propagando necesan kapitalon. Forflugis jam la tempoj, kiam en tiuj okazoj plej gravan kaj

eble solan rolon ludis buŝa propagando; hodiaŭ tiun ĉi rolon prenis sur sin preskaŭ ekskluzive skriba parolo, kiu bedaŭrinde postulas monon. Pro tiu cirkonstanco dormas ĝis nun landoj, kie ni ne havas eblon ekuzi tiun ĉi rimedon, pro tiu eble kaŭzo post ioma tempo haltos la propagando en tiuj landoj, kie elĉerpiĝos facile elĉerpeblaj oferitaj kapitaloj. Niaj malamikoj, kiuj ĝojas pro ĉiu nia malfortiĝo, faras el tiuj faktoj ilojn por elmontri al la mondo nian kvazaŭan malfortiĝon. Kompreneble tiu atako per si mem estas nur bagatelajo—pli grava ĉiam restas la fakto, ke ni estas ofte devigataj halti mezvoje nur pro manko de necesa kapitalo. Se ni havus nian fandan kapitalon, tiuj ĉi malhelpoj estus almenaŭ parte forigeblaj.

Mi donis supre unu ekzemplon, — ekzemplon, bedaŭrinde, plej oftan kaj plej dolorigan en la vivo de malpli grandaj societoj pasigantaj sian ekzistadon inter multego da malhelpoj kaj baroj. Tiu ĉi plej ofta cirkonstanco senarmigas la plej energiajn homojn, kiuj pro deviga ebla halto en mezvojo malvarmiĝas en fervoro ne estante certaj pri la estonteco de komencita afero. Mi donis nur unu ekzemplon, sed tiaj ekzemploj estas multaj kaj estas superflue ilin disvolvi al tiuj, kiuj el propra sperto konvinkiĝis pri ilia ekzistado.

Sed kiamaniere helpi al tiu bedaŭrinda situacio? Antaŭ ol niaj centraj organizacioj trovos por ĝi ian kon-

cernan, difinitivan rimedon, mi volus proponi al nia Centra Oficejo rimedon uzatan en multaj similaj okazoj. Eble ĝi estos dume duonrimedo, sed laŭ mia opinio ĝi povos alporti al ni grandan servon kaj krom tio ĉi ĝi estas facile kaj tuj realigebla.

Mi resumas mian proponon.

Inter esperantistoj troviĝas multaj homoj, kiuj volonte helpas ĉiu laŭeble en la kolekto de mono. La plej bona maniero por tio estas fondo de markoj kun proksimuma valoro, ekz. 0,25 *mS.* Tiaj markoj devas esti senditaj al ĉiuj societoj por disvendo. Multaj esperantistoj volonte prenos sur sin la taskon ilin disdoni kaj malgranda sumo, mi kredas, ne fortimigos samideanojn. Mi kompreneble ne povas antaŭvidi kiom oni kolektos tiamaniere, sed, se ni plenumos nian taskon energie, ni certe

povos ĉiujare liveri grandajn sumojn al tiu oficejo, kiu laŭ decido de esperantistoj estos elektita por gardi tiun aferon. La kolektita kapitalo eble en malproksima tempo kreskos tiel forte, ke ni povos havi en ĝi komencon de nia fera fonda kapitalo. La entrepreno estas tiel simpla kaj tiel facile realigebla, ke ŝajnas al mi, ke ĝi almenaŭ meritas tujan pripenson kaj difinitivan decidon pri ĝia realigo.

Dworski.

De la Redakcio. *Ni publikigas tiun ĉi projekton de S-ro Dworski, kiel efektive meritantan pli seriozan diskutadon. Ni esperas, ke ĉiuj esperantaj ĵurnaloj kaj organizacioj esprimos kiel eble plej rapide sian opinion, por ke la projekto, se ĝi estas efektive realiginda, tuj enpaŝu en vivon.*

Unua Internacia Kongreso de la Katolikoj Esperantistaj. (Paris, 30-an de Marto — 3-an de Aprilo).

Lia Alta Moŝto Monsinjoro Amette, arĥiepiskopo de Paris, kaj Monsinjoro Baudrillard, rektoro de la Katolika Instituto (france „Institut Catholique”), afable donis sian aprobon por nia kongreso, kaj metas je nia dispono por la kongresaj kunsidoj la grandan kunvenon de tiu famekonata Universitato, kiu estas — neniu tion ignoras — la plej grava Katolika Centrejo Intelekta de Parizo kaj de tuta Francujo. Aliparte, katolikaj eminentuloj, ĉu pastroj, ĉu laikuloj, simpatie akceptas la novaĵon de nia kongreso Esperantista; ĉio do promesas al nia afero grandan sukceson.

Programo. — La celo de nia kongreso estas duobla: unue (nerekta celo), doni al la mondo katolika vivantan, evidentegan pruvon de la utileco de la lingvo internacia por la katolikismo; due (rekta celo), organizi difinitive kaj praktike — tiamaniere ke ĝi estu Asocio vere utila por la Eklezio — la Tutmondan Katolikan Unuiĝon Esperantistan. Ĉar ĝi povos esti utila por la

Eklezio nur se ĝi havos specialan direkton, spiriton kaj agadon, ni devos kiel eble plej precize studi kaj difini dum tiu kongreso tiun direkton, tiun spiriton kaj tiun agadon. Ni do pristudos internacie nian estontan sintenadon en la plej urĝaj kaj gravaj demandoj rilataj al la vivo kaj al la prospero de la Katolikismo.

1-a *La unueco de la Eklezio:* Kiamaniere ni povas helpi al ĝi? Raportoj de Angloj, Rusoj, Bulgaroj, Rumenoj, k. t. p. pri tiu speciala punkto. Aliaj raportoj pri malpli gravaj, sed tamen interesaj iniciatoj, kiuj povas helpi al pli granda unueco en la Eklezio. — 2-a *La religia instruado:* ĝia neceseco: ĝiaj diversaj formoj: apologetiko, paroladoj, misioj, k. t. p. Raportoj sintezaj el diverslandanoj. — 3-a *La agado sociala:* ĝia nepre neceseco. La Evangelio estas fonto de sociala Justeco. Diversaj penadoj: edukado, sociala spirito, sociala scienco, popolaj kursoj, verkoj socialaj: Ligoj de aĉetantoj,

laboristaj domoj; batalo por observado de la dimanĉa ripozo; batalo kontraŭ alkoholismo, diboĉo kaj pornografio; junula kaj junulina prezervado: internacia protekto de la junulinoj. (Estas necese, ke ni havu raportojn pri la ĉefaj movadoj socialaj katolikaj ekzistantaj en ĉiuj landoj). — 4-a Fine *la materiala kaj praktika organizo* de la Katolika Unuiĝo.

De nun ĉiu kongresonto havas la devon prepari aŭ preparigi raportojn pri tiuj diversaj demandoj. Ĉiuj raportoj estu klaraj, precizaj, mallongaj kaj zorge skribitaj.

La Loka Komitato de la Kongreso zorgos por trovi, en la ĉirkaŭaĵoj de la Kongresdomo (apud la belegaj ĝardenoj de Luxembourg) taŭgajn hotelojn. Sufiĉas, ke ĉiu kongresonto, mendante sian kongreskarton, diru, kian sumon li deziras elspezi por sia ĉiutaga vivado. (La minimuma sumo estas 6 fr. por ĉiu tago.) Komunaj manĝoj, dum kiuj oni

parolos Esperante, estos ankaŭ aranĝitaj.

Afiŝoj en Esperanto pri la kongreso estos eldonitaj, kaj sendataj po unu ekzemplero al ĉiu kongresonto, kiu pagis sian karton. Pluaj ekzempleroj estos senditaj afrankite, kontraŭ fr. 0,25 por ĉiu afiŝo, al kiuj ilin mendos.

La organiza komitato konsistas el sekvantaj personoj: S-ro Richardson, prezidanto; S-ro Pastro Gautier, parohestro de Saint-Gervais (Paris); S-roj Abatoj: Duvaux, Derroite, Chevallier, Aigouy; S-ino Baronino de Ménil, F-ino Larroche, S-ino Josée Guivy, S-ro Cl. Colas. La Internacia Komitato konsistas el ĉiuj korespondantoj de Espero Katolika en diversaj landoj, kaj el la estroj de la naciaj sekcioj de Katolika Unuiĝo Esperantista.

Por la Komitato: La Sekretario de la Kongreso,
Cl. Colas.

Danko.

Okaze de la kvindeka datreveno de mia naskiĝo mi ricevis grandegan multon da bondeziroj en plej diversa formo: telegramojn, leterojn, poŝtajn kartojn, gazetajn artikolojn, librojn, manuskriptojn, fotografaĵojn, k. t. p. Ĉio ĉi tio profunde min kortuŝis, kaj mi tre dezirus esprimi al ĉiu gratulinto aparte mian plej koran dankon; sed bedaŭrinde tio estas por mi fizike neplenumbla. Tial oni volu pardoni min, ke, anstataŭ respondi aparte al ĉiu persono, aŭ almenaŭ al ĉiu gazeto, societo aŭ grupo, mi esprimas mian plej profundan dankon al ĉiuj kune, per ĉi tiu publika letero. La gazetoj esperantistaj faros al mi grandan komplezon, se ili publikigos mian dankon.

Varsovio, 20. XII. 1909.

L. L. Zamenhof.

Al niaj francaj samideanoj.

La terura malfeliĉo, kiu trafis Francujon en la lasta tempo ekdolorigis korojn de la tuta homaro. Ni kredas, ke en la momento, kiam eliros tiu ĉi numero, la terura superakvego, kiu kaŭzis tiom da mizero al la ranca popolo estos nur malĝoja rememoraĵo. Ni sendas nian profundan kondolencon al la francaj samideanoj kaj tutkore deziras al ili, ke tiaj malfeliĉoj evitu por ĉiam ilian landon.

Redakcio.

La orientaj sercoj.

(Humoraĵaj rakontoj de Roda Roda).

I. Ĥejri, Surkur' Bubalo.

Unu fojon ĥalifo faris juĝon en Bagdado. Antaŭ lia trono aperis neordinaraj plendistoj: la kamelo — Ĥejri, la azeno — Gurkur kaj la bovo — Bubalo. Ĥejri alparolis je la nomo de ĉiuj tri:

— Nobla ĥalifo! — li komencis — vazo kaj ujo de justeco! Grizbarba fonto de lumo! Beleco de l' trono! Sceptro de popola konfido! Ni, ĉiuj trio, — mi, Ĥejri, Gurkur kaj Bubalo, aperis antaŭ via afabla vizaĝo alporti plendon je homoj, kiuj malhonoras nin, bestojn kaj ŝanĝis niajn honestajn gentajn nomojn en reciprokan insulton kaj mallaŭdon. Se homo faris malsaĝon, aliaj homoj diras al li „ho, vi kamelo, azeno, bovidaĵo!”. Saĝa ĥalifo! Malpermesu al homoj malbonuzi niajn nomojn”.

La ĥalifo longe konsideris kaj fine diris:

— „Via plendo, videble, ne estas senbaza, kaj tamen al via malfeliĉo estas malfacile helpi: tiu ĉi kutimo jam tre forte inokuliĝis; ĝi ne elradikiĝos per malpermeso. Homoj tro kutimis opinii vin malsaĝaj. Mi tamen provos. Iru — vi, Ĥejro al oriento, vi, Gurkuro — al sudo, — vi, Bubalo — al okcidento kaj serĉu, ĉu trovos sin homo, kiu estos pli malsaĝa ol unu el vi. Post unu semajno vi revenu kaj komuniku al mi rezultatojn de viaj migroj. Tiam mi decidus, kiel oni devos agi en la estonta tempo.

Pasis unu semajno, kaj ili trio aperis antaŭ la ĥalifo komuniki kion ili trovis.

Unua parolis Bubalo:

— „En la urbo Arbelo mi estis atestanto de juĝo kontraŭ juna Abdulo. Oni kulpigis lin je ŝtelo de saketo, en kiu estis oro de unu armeniano Gigozo.

Oni arestis lin kaj trovis ĉe li multe da oro, kvankvam Abdulo devenis el malriĉa familio.

Abdulo, plorante, kredigis, ke li estas senkulpa kaj ke li en tiu ĉi tempo estis ne en la butikoj, sed hejme kune kun sia patrino.

„Se tio ĉi estas vere, diris Kadio de Arlo, alvoku lian patrinon, mi demandos ŝin: mi konas ŝin; ŝi estas pia kaj honesta virino, ŝi ne mensogos”.

Kaj li ordonis alvenigi Abdulan patrinon.

Diru, nobla ĥalifo, ĉu tiuj ĉi homoj ne estas pli malsaĝaj ol bovoj; ili imagas, ke patrino ne estas kapabla fari jurkrimon por utilo de sia infano?”

— Vi gajnis vian aferon, diris la ĥalifo, nun ni aŭskultos Gurkuron.

— „Kaj mi, kaj mi! ekkriegis la azeno, mi, videble, ankaŭ solvis mian temon. Kurante sur la stratoj de l' urbo Gangamelo mi vidis ribelistojn, sieĝintajn la domon de l' urbestro. Ili kaptis lin kaj faris juĝon, kulpigante lin je profitemo kaj hipokriteco. Poste ili forbruligis lin sur lignaro kaj anstataŭ li elektis novan urbestron Omeron-ibu-Selimon.

Nova urbestro Omero promesis al ili regi honeste kaj konscience, zorgante nur pri komuna bono. Ili, aŭdinte tion ĉi, ĝojis kaj gajis, ke nun ĉe ili estas urbestro pli bona ol la antaŭa.

Diru, saĝa ĥalifo, ĉu homoj ne estas pli malsaĝaj ol azenoj? Ili kredis, ke homo havanta potencon zorgos pri komuna bono kaj ne pri sia propra”.

La ĥalifo enpense ekbalancis la kapon je l' signo de konsento kaj ordonis paroli al la kamelo — Ĥejro.

— „Mi paŝtiĝis, rakontis Ĥejro, sur herbejo. Preter mi sur la vojo iris: fraŭlino kaj viro. Li certigis ŝin pri io, sed ŝi nur balancis la kapon. Tiam la viro diris:

„Mi amas vin; mi ĵuras, ke mi amas vin!”.

Sed ŝi ne volis aŭdi, parolante, ke

li estas nekonstanta kaj ke li morgaŭ forgesos ŝin.

„Neniam, mia kara, mia adorata, li ekkriis, mi ĵuras, ke mi amos vin eterne, tiel varmege, kiel nun!”

Aŭskultante tion ĉi, la juna fraŭlino alpremis sin al lia brusto kaj ili komencis sin kisi.

Diru, nobla ĥalifo, ĉu la homo, ĵuranta je l' eterna amo, ne estas pli malsaĝa, ol kamelo? Kaj ŝi, kiu kredis al li?...”

— Sufiĉe! interrompis la ĥalifo. Vi, ĉiuj tri sufiĉe argumentis vian pravcon.

Mi ĵuras je l' mia barbo, ke mi ne permesos al neniun bonreligia muzulmano nomi homon pro lia malsaĝo „kamelo”, „bovo” kaj „azeno”. Vi povas foriri”.

Ili tri eliris. Apud la pordego la kamelo diris:

„Ĉu vi volas veti, miaj fratoj, ke el nia afero estos nenio? Tiu ĉi maljuna azeno imagas, ke iu obeos lian malpermeson.

tradukis

P. Matusewicz.

La Kometo de Halley.

La aperonta sur nia horizonto kometo apartenas al tiuj vagantaj brilkorpoj, kiuj aperas periode kaj krom tio ĝi estas sola el la periodaj kometoj, kiu estas videbla sen teleskopo. Ĝi portas nomon de sia eltrovinto Halley.

Antaŭ tiu ĉi astronomo kometoj estis konsiderataj kiel ĉielaj korpoj, kiuj moviĝas en la ĉielaj spacoj laŭ neregulaj vojoj kaj aperas ĉe ni tute okaze. Aristoteles pensis eĉ, ke kometoj estas simplaj meteoroj, kiuj formiĝas sub la influo de varopiĝoj. La mezcentjaraj sciencistoj opiniis simile. Nur Seneka konsideris kometojn, kiel korpojn parencajn al planetoj. La unua divenis la efektivan naturon de kometoj Newton kaj li provis argumenti iliajn periodecon. Edmund Halley pruvis, ke ilia periodeco estas senduba.

Newton ellaboris sistemon de la migrado de ĉielkorpoj, Halley ekuzis tiun sistemon al la kometo, kiu devis aperi en 1682 jaro.

Esplorinte la elementojn de ĝia orbito, Halley antaŭdiris, ke la kometo, kiun li observis devis ree aperi en 1758 aŭ 1759 jaro. Kompreneble, li ne povis esperi, ke li ĝisvivos ĝian reaperon, kaj zorgante pri sia postmorta gloro, li skribis la sekvantajn vortojn en 1705 jaro: „Se la reveno de l' kometo okazos en la antaŭdirita tempo, la senpartia posteularo ne rifuzu konsenti, ke estis anglo kiu unua antaŭdiris tion”.

Halley mortis 17 jarojn antaŭ la apero de l' kometo. Ĝi efektive revenis en la antaŭ-

dirita tempo nur kun malgranda malfruiĝo pro diversaj planetaj perturbacioj, kiujn ankaŭ antaŭdiris Halley.

En Majo de la nuna jaro la kometo de Halley devas ree aperi sur la horizonto de nia planeto.

La astronomiaj kalkuladoj antaŭdiras, ke tiu-ĉi-foje la vosto de l' kometo trairos tre proksime de nia planeto, kaj eble kaŭzos katastrofon. En la lasta tempo novaj kalkuloj kaj ĉefe de Flammarion donis kvietigantajn sciigojn laŭ kiuj, la renkonto de l' kometo kun nia planeto ne efikos kataklismojn.

Tiuj ĉi diversaj opinioj devenantaj de famaj astronomoj plej bone pruvas, ke kvankam la astronomiaj teorioj estas precizaj kaj geniaj, tamen ili ne estas tute seneraraj. Sur la vojiron de la kometo Halley sendube havas grandan influon iu ankoraŭ nekonata planeto troviĝanta proksime de Neptuno.

Kredeble la apero de l' kometo de Halley, se ĝi estos sufiĉe brila kaj faros impreson, kaŭzos multe da antaŭjuĝoj. Jam hodiaŭ kelkaj malfeliĉoj, kiuj trafis Eŭropon en la lastaj monatoj estas konsiderataj, kiel rezultato de l' Dia puno. La kultureco de l' nuntempa homaro permesas ankoraŭ atendi de ĝi multajn neantaŭvideblajn malklerajojn, tamen forpasis jam la tempoj de senkultureco kaj sovaĝeco. Do, ni esperu, ke la estonta apero de l' kometo ne kaŭzos tiajn rezultatojn, kiuj estis eblaj en la pasintaj jarcentoj.

„Stelo”.

Al la Majstro.

De longe sub verda standardo revuloj
 Por nobla batalas afero,
 Al ili ariĝas geniaj pensuloj,
 Neniu sin sentas ĉe ili fremduloj,
 Ĉar ĉiujn kunligas espero.

La tero traĝis de sango la frata
 Fluanta dum longaj jarmiloj,
 Sed teron sekigos estonto benata
 De l' nia ideo plej kara, amata,
 De l' hela estonto sunbriloj!

Hej, fratoj karegaj, de l' vero senditoj,
 Per vortoj de flama fervoro,
 Ni igu en homojn la noblajn ekscitojn,
 Ni veku kuŝantajn en dormo spiritojn,
 Kuraĝe al paca laboro!

El brustoj de l' homoj forigu ni ŝimon,
 Estonto pli hela ekflamu!
 Ni veku al ago en koroj maltimon,
 Ĉar vidas ni ĉiuj de celo proksimon,
 Ni vivon pli bele ornamu!

Regnanoj de l' mondo, celantaj la pacon
 Sur tero la amon ni semas,
 Vilaĝan dometon aŭ riĉan palacon,
 Ni ĉion vizitas, ne konas ni lacon
 De ĉiuj ni korojn alpremas!

Dum iro nenia haltigos nin baro,
 Nek venkos la vortoj kruelaj,
 Ni portas la amon al tuta homaro
 Por nia ideo en ĉiu la faro
 Ni restos eterne fidelaj!

Hej, fratoj amataj, de l' vero senditoj,
 Ni veku kuŝantajn en dormo spiritojn,
 Ni restu eterne fidelaj

Al Majstro!!

(Łódź)

S. Karolczyk

Mistrzowi.

Zielony nasz sztandar gromadzi szermierzy
 Walczących za sprawę ludzkości;
 Skupiają się pod nim zastępy rycerzy,
 I nikt z nich nie wątpi i każdy z nich wierzy,
 Zwycięstwo już w blizkiej przyszłości.

Krew bratnia już ziemię zrosiła obficie
 I płynie przez lat już tysiące;
 Choć wsteczne dziś prądy nurtują wciąż skry-
 Idea nam błogie zwiastuje wciąż życie [cie,
 I wschodzić zaczyna już słońce.

O bracia kochani! niech serca gorące,
 Niech słowa wasze płomienne
 Zniweczą tamy narody dzielące
 I wskrzeszą ludy w letargu drzemiące
 I zbudzą dusze ich senne!

Więc z uczuć, więc z piersi usuńmy pleśń
 Niech przyszłość jaśniejsza zaświta! [starą—
 Pokrzepmy swe serca odwagą i wiarą...
 Dość, dość już snuć życia tę przędzę tak sza-
 Piękniejszy niech byt nam wykwita! [rą —

O rodzie ty ludzki, pokoju spragniony!
 Wszak siejem my ziarna miłości;
 Czy w chaty wieśniacze, czy w gmachów salony
 Nadzieję my niesiem we świata wsze strony,
 My lepszej zwiastuny przyszłości.

My w naszym pochodzie nie znamy prze-
 Choć w drodze i osty i ciernie; [szkody
 Gałązką oliwną witamy narody,
 Idea nas wiedzie przez lądy i wody
 Więc służyć będziemy jej wiernie.

O bracia kochani! wy prawdy wysłańcy!
 Obudźmy drzemiących, zapalmy kagańce
 Zostańmy wiernymi

Mistrzowi!

Wolny przekład z języka Esperanto

Franciszka Endera



Kronika. — Kroniko.

Pola esperantista movado.

Ni petas insiste la filiojn de „P. E. S.” kaj ankaŭ ĉiujn sendependajn polajn societojn de esperantistoj sendadi regule ĉiumonate raporton pri la movado en iliaj urboj.

Varsovio. La Varsovia Esperantista Societo por festi la kvindekjaran datrevenon de D-ro L. L. Zamenhof aranĝis la 19-an de Decembro teatran vesperon. La dato de 19-a estis elektita pro diversaj teknikaj kaŭzoj. La 15-an la varsovia societo salutis la aŭtoron de Esperanto en lia privata loĝejo, kie krom la societo Esperantista esprimis al li sian gratulon la rondo farmacia de Esperantistoj kaj multaj apartaj personoj. Ni, kiuj havis okazon vidi D-ron Zamenhof en tiu memorinda por li tago konvinkiĝis, kiel grandan emocion kaj kortuŝecon elvokis en lia koro la esprimoj de gratuloj kaj sindoneco, kiuj poŝte kaj telegrafe alvenadis al li de ĉiuj anguloj de la terglobo. D-ro Zamenhof rifuzis vidi en tiuj ĉi esprimoj de gratuloj kaj bondeziroj personan karakteron. La jubileo de lia naskiĝo estis por li nur jubileo de ĉiam progresanta Esperanto.

La 19-an de Decembro en la granda salono de la Teknikista Societo en Varsovio kolektiĝis ĉirkaŭ 700 personoj por ĉeesti nian grandan koncerton. Aranĝo de pli grandaj esperantaj koncertoj en Varsovio ne apartenas al facilaj entreprenoj kaj la koncerta komitato, devis venki multajn malhelpojn por efektiviĝi sian planon, kiu sukcesis bonege.

Pro tio ni devas esprimi en la nomo de ĉiuj Varsoviaj Esperantistoj profundan dankon al la komitato, kiu konsistis el Sinjorinoj: Belmont, Grabowska, Zofja Rejchman senlaca samideano kaj Sinjoroj L. Belmont, A. Grabowski, D-ro J. Krenicki, Loth, D-ro Róbin energia propagandisto kaj al ĉiuj

aliaj, kiuj per siaj konsiloj kaj helpo subtenis la komitaton.

Laŭ la unua projekcio antaŭparolon al la koncerto devis publikigi nia konata pola kaj esperanta verkisto S-ro Leo Belmont. Tamen kelkajn tagojn antaŭ la koncerto S-ro Belmont estis malliberigita pro unu pola artikolo en sia gazeto „Wolne Słowo“ (Libera Vorto) kaj lian rolon prenis sur sin neniam laciĝebla nia estimata prezidanto S-ro A. Grabowski. Lia bonega propaganda parolado, kies parton ni donas en la komenco de ĉi-tiea numero konatigis la multenombrajn gastojn kun la nuna stato de Esperanto. Varmaj aplaŭdoj atestis plej bone, ke nia afero atingis deziritan rezultaton de parolado de S-ro Grabowski.

Post tiu unua propaganda parto de la vespero sekvis parto koncerta, kiun malfermis la himno „Espero” sub la direkto de nia konata muzikisto S-ro Godecki plenumita de vira ĥoro. La muziko de S-ro Ménil elvokis multajn aplaŭdojn kaj devigis la kantistojn al ripeto.

S-ino Comte - Wilgocka, varsovia operkantistino, per sia rimarkinda kaj ĉarma voĉo, kantis en pola kaj esperanta lingvoj romancojn de Żeliński kaj Szopski.

S-ro Czerwiński la bone konata en niaj esperantaj koncertoj deklamisto (konstanta instruisto de Esperanto ĉe la varsovia societo) per sia dolĉa lirika voĉo deklamis diversajn esperantajn poeziojn.

S-ro Rechtleben, varsovia operkantisto, kantis arion el la opero „Maska balo” kaj „Kiam iris Staĥ’ militon” de Noskowski.

En la parto instrumenta partoprenis S-ro W. Kenig (violonisto) kaj sesjara knabeto Adamo Gelbtrunk, kiu elmontris grandan virtuozan talenton sur fortepiano.

La koncerton finis bonega deklamo de nia samideano S-ro J. Mikulski,

drama artisto, kiu majstre deklamis la konatan impresplenan poemon de M. Konopnicka en esperanta traduko de A. Grabowski.

La multenombra publiko faris grandan ovacion al la ĉeestinto D-ro L. L. Zamenhof kaj ĉe fortepiana akompano de S-ro A. Grabowski ĥore ekkantis la himnon „Espero”.

La propaganda rezultato de la koncerto estis tute kontentiga. Ĝi varbis por nia afero eĉ tiujn, kiuj longan temp-on moke kontraŭbatalis nian agadon. La gastoj disiris kun konvinko, ke nia ideo ne estas jam utopio, sed ĉiam pli realiĝanta fakto. Ni esperantistoj disiris kun konvinko, ke bona leciono en viva vorto estas plej bona propaganda ilo por varbi al nia afero homojn obstinajn kaj nekredemajn.

Post la koncerto en la „Angla hotelo” kolektiĝis ĉirkaŭ 50 personoj por fini en komuna banketo la bele komencitan vesperon. Inter la ĉeestintoj troviĝis ankaŭ S-ro A. Niemojewski, la konata pola sciencisto kaj literaturisto. Dum la vespermanĝo, kiu daŭris ĝis la 3-a horo matene la kunvenintoj havis okazon aŭdi bonegajn esperantajn paroladojn, eldiritajn sub la adreso de la jubileato kaj lia granda verko. Bonegan kaj elokventan parolon havis nia simpatia gasto S-ro A. Niemojewski. En sia longa parolado li atentigis pri la granda tuthomara signifo de lingvo internacia. Li plendis ankaŭ pro la indiferenteco de tiu ĉi homaro, por kies bono estis elrovita tiu ĉi grandsignifa ilo de interkompreniĝo. Sed laŭ lia opinio ĉiuj epokfarantaj verkoj kaj eltrovoj havis la saman sorton, — novaj kaj grandaj ideoj ĉiam renkontas plej fortajn malhelpojn. Lia scienca, neordinare interesa kaj plena de historiaj ekzemploj parolado elvokis tondron da aplaŭdoj, per kiuj la ĉeestintoj volis esprimi al la parolinto ne nur sian dankon por la interesa kaj instrua parolado, sed ankaŭ sian grandan ĝojon pro akiro de nova samideano, fama scienculo kaj literaturisto. S-ro A. Niemojewski en varma kaj longa artikolo priskribis poste tiun ĉi memorindan por ni ves-

peron en sia multelegata ĵurnalo: „Myśl Niepodległa”.

En la vespero partoprenis kelkaj delegitoj el la provincaj filioj de „Pola Esperantista Societo”. S-ro Karolczyk el Łódź, deklamis sian belan poezion, kiun ni presas en ĉi tiu numero. S-ro F. Ender, prezidanto de Lodza societo, deklamis tiun ĉi saman poemon en sia pola traduko.

Malgraŭ malfrua horo la kunvenintoj disiĝis kun bedaŭro, dezirante al si reciproke, ke tiaj belaj tagoj repetiĝu, kiel eble plej ofte.

Lvovo (Lwów). Nia Societo solidariĝante kun la tutmonda Esperantistaro festis solene la jubilean naskotagan datrevenon de la Majstro. Jam unu semajnon antaŭ la festa tago granda parto da societanoj fotografigis sin komune kaj sendis la fotografajon kun konvena gratula letero al D-ro L.L.Zamenhof. La 15-an de Decembro 1909 estas aranĝita en la klubejo solena vespero por la societanoj kaj enkondukitaj de ili gastoj. La belege ornamitaj ĉambroj de nia societejo estis troplengigitaj de multenombra solene vestita publiko. La feston komencis la prezidanto s-ro D-ro Skalkowski per bela, esperanta prelego pri la vivo de la Majstro, esenco kaj historio de Esperanto. Poste paroladis samsence en pola lingvo sekretario s-ro Adler. Sekvis koncerto, tre lerte reĝisorita de F-ino Hempel. La abunda programo, plenumita ekskluzive en esperanta lingvo, konsistis el du solistaj kantoj, komedieto, monologoj, dialogo, deklamadoj. Ĉiuj punktoj plene sukcesis kaj alvokis varmegajn aplaŭdojn de la ĉeestintaro. La apogeo de la soleno estas atingita je fino, kiam ĉiuj societanoj ekleviĝis kaj ekkantis ĥore, ĉe akompano de muziko la altflugan himnon „La Espero”. La okazinta festo trovis viglan resonon en la Lvova ĵurnalaro, kiu preskaŭ senescepte raportis pri ĝi en pli aŭ malpli grandaj notoj. Krom tio „Kur. Lwowski” kaj „Gaz. Narodowa” enpresigis okaze de la jubileo vastajn artikolojn pri la jubileulo kaj signifo de Esperanto, „Kurjer” donis eĉ du artikolojn, el kiuj unu, redakcia estas metita je ĉefa loko de

la ĵurnalo kaj unu, devenanta el la plumo de fama profesoro de Universitato, D-ro Benedykt Dybowski--en la kroniko.

La 12-an de Januaro 1910 okazis la ĝenerala jarkunveno de niaj societanoj. Prezidanto s-ro D-ro Skalkowski en malferma parolado raportis pri la agado de la estraro kaj stato de la societo dum la pasinta jaro. Resuminte la faktojn, konatajn el la antaŭaj korespondaĵoj, presitaj en „Pola Esperantisto”, li konstatis la ĉiam pli profundan enpenetradon de esperantisma ideo en niajn rondojn kaj la konstantan, ĝojigan progresadon de esperantista movado en Lvovo, kion ĉefe pruvas la grava, preskaŭ duobla plimultiĝo de nia aktiva anaro. Laŭ propono de s-ro D-ro Fels la kunveno danke akceptis la raporton de la prezidanto, esprimante la plej altan rekonon nune: al s-roj D-ro Skalkowski kaj juĝa senatano Wierzchowski pro iliaj penoj, kiujn ili plenumis, gvidante neprofiteme la publikajn kaj gimnaziajn kursojn de Esperanto, due: al f-ino Hempel pro ŝia plivigliĝo de societa vivo per la reĝisorado de teatraj prezentadoj.

Post plenumo de administraciaj aferoj, kiel: akcepto—laŭ propono de s-ro Pajor, membro de la revizia komisiono—de la kasa raporto, prezentita de s-ro Wierzchowski, akcepto de la biblioteka raporto, antaŭmetita de s-ro Herold kaj decido pri la budĝeto por la jaro 1910, oni alpaŝis al la baloto de nova estraro. Estas elektitaj gesinjoroj: 1) D-ro Bronisław Skalkowski (prezidanto), 2) juĝa senatano Hieronim Wierzchowski (vicprezidanto), 3) Artur Adler (sekretario), 4) Laurenty Pajor (kasisto), 5) Benedykt Herold (bibliotekisto), 6) Fryderyka Bohin, 7) Regina Fels, 8) Helena Hempel, 9) D-ro Szczepan Mikołajski (komitatanoj). Kiel membroj de la revizia komisiono estas elektitaj s-roj: 1) Stanisław Łazica, 2) D-ro Achilles Rosenkranz, 3) Adam Krach.

Ĉe la lasta punkto de la tagordo, nome: proponoj de anoj, ekparolis sekr. Adler. Raportinte pri la financa stato de „Pola Esperantisto” priskribita en la decembra № de tiu ĉi gazeto, li alvokis varmege kaj insiste la ĉeestintojn, por

ke ili nepre ĉiuj ekabonu „Polan Esperantistan” kaj varbu por ĝi kiel eble plej multe da novaj abonantoj. Konkludante li deklaris, ke ĉiu vera Esperantisto havas du ĉefajn moralajn devojn nome: aparteni al ia esperantista organizaĵo kaj aboni almenaŭ unu, t. e. sian naciesperantan gazeton. Poste li proponis, por ke la kunveno decidu kaj la estraro letere transsendu specialan dankon al la ĵurnaloj „Kurjer Lwowski” kaj „Gazeta Narodowa”, kiuj per ofta enpresigado, dank’ al klopodoj de D-ro Mikołajski kaj D-ro Skalkowski, de artikoloj pri Esperanto elmontris grandan bonvolon por nia afero kaj treege al ĝi servis. Tiu ĉi propono estas akklamacie akceptita.

Sekvis parolado de s-ro D-ro Mikołajski: Kiel en la antaŭa ĝenerala kunveno li donis komence interesan revuon de la tutmonda esperantista movado dum la jaro 1909. Poste li konsilis al la ĉeestintoj, por ke ili disvastigu ne nur la esperantan lingvon, sed ankaŭ kaj precipe la „internan ideon de Esperantismo”, tiun ĉi ideon de vera, universala homamo, de sincera interfratigo de popoloj, ĝis nun bedaŭrinde disigitaj de tiom da baroj politikaj, religiaj kaj sociaj. Li instigis ankaŭ al pli vigla esperantista propagando en nia lando kaj en nia urbo, ĉar post du jaroj la popolo esperantista festos la dudekkvinjaran jubileon de Esperanto kaj tiam okazos verŝajne universala esperantista Kongreso en Krakovo; estas do necese, por ke la Poloj elpaŝu en la jaro 1912 grandare kaj montru al la miloj de fremdaj samideanoj, ke ankaŭ ni estas kapablaj rekoni la meriton de D-ro Zamenhof kaj ŝati la signifon de lia genia kreitaĵo por la tuta homaro.

La kunsidon finis s-ro D-ro Fels per alparolo al niaj novevarbitaj anoj. Konstatinte la bedaŭrindan aperaĵon, ke ĉe multaj homoj la ekinteresiĝo por Esperanto similas al „pajla fajro”, li petis la novajn adeptojn, por ke ili spite la komencaj malfacilaĵoj persistu ĉe la verda standardo kaj tiam ili kiel rekompencon pro sia laboro certe akiros ne nur praktikajn utilojn, sed ankaŭ altajn, spiritajn ĝuojn.

Łódź (Lodzo). Post kiam ĝenerala kunveno de Lodza Esp. Filio aprobis proponon de D-ro A. Goldenberg: aranĝi grandan feston publikan honorigontan 50-an naskotagon de nia kara Majstro kaj samtempe sciigontan lodzanojn pri nia afero en la mondo ĝenerale kaj en Lodzo speciale, troviĝis granda nombro da samideanoj kiuj promesis nin helpi en nia laboro. S-ro Miševski komencis pli ofte ripetadi provojn de nia esp. ĥoro (pli ol 20 viroj), S-ro F. Ender disdonis la rolojn al ludontaj „Aman bileton”, F-ino M. Vinter helpis al ni inviti kantistojn, F-ino C. Skjipińska helpis aranĝi vivan pentraĵon „Apoteozo de Esperanto”, S-ro Dlujevski kun sia edzino preparis belan multekostan verdan standardon, S-ro Muĥatajev faris verdan stelon elektre lumatan, S-oj Michel kaj Stephanus promesis akompani, fervoraj samideanoj kaj belaj samideaninoj partoprenis en disvendado de biletoj, reston — kiel elekton de salono por raŭto, anoncadon kaj reklamadon, prilaboradon de programo kaj multajn diversajn taskojn prenis sur sin la sekretario D-ro Goldenberg. Ne estas do mirinde, ke la raŭto aranĝita de tie fervoraj samideanoj la 18-an de Decembro 1909 j. treege sukcesis. En la manoj de la bela kasistino F-ino M. Stavovčyk restis nur kelkaj biletoj, ĉar kolektiĝis en granda salono de „Liro”, pli ol 350 personoj. Sufiĉe provizita bufedo, ĉe kiu afable disvendadis doktoredzino Goldenberg, profesoredzino Lipska, F-ino Rothert, F-ino Z. Kuhn, estis tute elĉerpita, kio ne pravas, ke samideanoj posedas ian eksterordinaran apetiton, sed nur tion, ke raŭto esperantista malgraŭ granda, eĉ tro granda programo, ne malhelpis digesti. Prologo de nia kara poeto S. Karolčyk de li mem deklamita, efikis grandan impreson inter samideanoj, polan tradukon kortuŝante elparolas F-ino Janina Ender, nia prezidanto havas festan paroladon pole kaj esperante prilara kara Majstro, ĥoro finas la unuan parton per bela kanto „Por samideanoj” „Vane revii” k. t. p. Inter-paŭzo daŭras kvaronhoron, kiu sufiĉas al fervoraj F-ino Gontarska kaj S-ro Pfejfer por disvendi

multajn poŝtkartojn, Ĉefeĉŝlosilojn, steletojn k. t. p.

Duan parton komencas S-ro F. Ender kaj Muĥ... ankaŭ F-inoj M. Vinter kaj Jadviga Ender per vigla kaj konsenta ludo de „Ama bileto” de M. Balucki (traduko de F. Ender, eldono de S-ro Miševski en Lodzo). La publiko estas ravita, kiel per ludado, tiel per bonsonoreco kaj komprenebleco de nia lingvo, de multaj ĉeestantoj eble la unuan fojon aŭdita. Poste sekvas kanto de F-ino Sliverska (pole) ludado fortepiane de F-ino Thiele, deklamado de deklamara A. Broĥocki, kanto de ĥoro, ripetita laŭdeziro de publiko. Dua interpaŭzo. Aranĝantoj timis, ke pligranda parto de publiko disiros laca kaj pro malfrua horo (la 1-a nokte). Male! Vigneco kreskas. Poŝtludo interesigas multajn neesperantistojn, ili aĉetas ŝlosilojn por kompreni leterojn al ili adresitajn. Sed oni devas fini. S-ro Górski belege kantas pole: „Toreadoron”, S-ro Muĥ..., „Mondano” deklamas gaje post serioza deklamado de S-ro Kaŝyński („Sonoriloj” de Ujejski, trad. D-ro Lono Zamenhof). F-ino Vinter ronkema ne povas kanti. Publiko tre bedaŭras, sed pro la bela kanto de „Serenado” de Braga, en la unua parto, oferas al ŝi belan buketon. Nun parolas D-ro A. Goldenberg parkere esper. kaj pole pri la lingvo esp., pri ĝia disvastiĝado en la tuta mondo, pri la stato de nia afero en Lodzo kaj invitas enskribiĝi en societoon kaj kurson. Fine aperas viva bildo. Maldekstre staras bela statuo de la Progreso (F-ino Żelinska) kun fakelo en la mano. Bele vestita, per verdaj steletoj ornamita, Esperanto (S-ino Dlujevaska) kondukas la homaron al la progreso. Super ŝia kapo brilas elektre lumigita granda verda stelo. La homaron prezentas unu japanino (F-ino Z. Kuhn), malgrandrusino (F-ino Kozytovska), bela hispanino, kies familnomon mi ne memoras, du italaninoj (S-ino Lisicka kaj F-ino Z. Falcman), danino (F-ino M. Vinter), polo (S-ro Rutkieviĉ), malgrandruso (S-ro Zaar), tirolo (S-ro Roviński) kaj aliaj. La ĥoro dume kantas meze de publiko nian himnon. Grandega impreso! La kurteno falas,

sed la publiko aplaudas, ĝi volas ankorau unu momenton vidi belan pentraĵon kaj ĝiajn belajn partoprenantojn. Jam estas ĉirkaŭ 4-a nokte, sed la junularo ne volas iri dormi, ĝis la 5-a daŭras diversaj ludoj. Nian raŭton vizitis du karaj gastoj el Piotrkovo: S-roj R. Vogel kaj S. Bieńkowski. La komitato en tiu ĉi loko esprimas sian koran dankon al ĉiuj partoprenintoj de la raŭto, al samideanoj lodzaj kaj piotrkovaj kaj al gastoj vizitintaj nian amuzan vesperon.

Vivu Esperanto! Vivu nia Majstro!

Piotrków. Nia filio en la fino de Septembro decidis eldoni propran kvaronjaron organon. Estis jam elektita redakcia komitato kaj organizita varbado de kunlaborantoj, sed subite ni ricevis alvokon de la eldonanto de „Pola Esperantisto”. Tiu alvoko vekis en la redakcia komitato dubon, ĉu progresos bone provinca, kvaronjara ĵurnalo, se ne trovis subtenadon de flanko de polaj esperantistoj ĵurnalo monata, zorge redaktata de niaj esperantaj eminentuloj. Fine la komitato esprimis decidon dume ne eldonadi sian ĵurnalon, sed instigi lokajn samideanojn al abono de „Pola Esperantisto”. Ni estas certaj, ke tiamaniere ni nur evitis tre malagraban eventualan fermon de la proponita ĵurnalo, pro manko de subteno.

Jubileon de nia majstro nia filio solene festis la 16-an de decembro per vesperkunveno, kies programo konsistis el kanto, deklamoj kaj parolado. Parolis S-ro Vogel pri signifo de la jubileo por esperantista mondo kaj deklamis kun granda entuziasmo 5-jara samideano Janĉjo Rożanowicz, krom tio monologis S-ro Mielczarski kaj deklamis S-ro Karbowski. La vesperon finis kanto de la ĥoro, post kiu, dank’ al niaj fervoraj samideaninoj, preparintaj propramane vespermanĝon, ni trinkis je sano de nia majstro ĉe komuna tablo.

La vespero kvankam havis tute privatan karakteron, kaj estis dediĉita nur por membroj, restos sendube bela rememoraĵo por ĉiuj ĉeestintoj.

En fino de januaro okazos ĉi tie propaganda vespero, aranĝota en loka teatro. Ni havas esperon, ke tiu ves-

pero grave signifos en la varbado de membroj en nia urbo.

Jus finiĝis kurso de Esperanto, kondukita de S-ro Vogel, kies sekvo estas bona kono de la lingvo de 14 personoj. Nova kurso, kondukota de S-ro vicprezidanto Pinko, komenciĝos post propaganda vespero.

„Birdo”

Kielce. Nia societo suferis gravan perdon, nia vicprezidantino S-ino E. Podlodowska ekŝiĝis el la komitato transloĝiĝinte Krakovon. Bonege konante la lingvon, ŝi ĉiam vive partoprenis en la vivo de societo. Esperanton ĉiam studis en ĉefverkoj de nia literaturo, kaj donis al ĉiuj ekzemplon de serioza sindonemo al la afero. Nun, post somera libertempo, nia societo rekomencis la agadon: oni kunvenas dufoje en la semajno kaj laboras tre vigle, insiste; ĉiuj rapidas akiri plej grandan perfektecon en la lingvo kaj baldaŭ almenaŭ dek personoj el nia societo plue kaj lerte parolos Esperanton. Samtempe, ni konatiĝas ankaŭ kun la „spirito” de esperantismo; dank’ al tiu spirito la interna vivo de la societo esperantista en Kielce tiel diferenciĝas de la interna vivo en aliaj societoj en nia urbo. Neniaj malkonsentoj, neniaj intrigoj, envioj, nenia malamikeco kaj reciproka malkonfido aŭ mokemo; oni sentas sin en nia societo, kiel en rondo de gamikoj kaj la horoj de laboro pasas gaje, laŭte, interesplene, rapide, mal-enue.

La 12-an de Novembro ni havis ĝeneralan kunvenon por kompletigi la komitaton. Unuanime kaj unuvoĉe, ni elektis per aklamacio S-ron D-ron de medicino M. Steckiewicz. Dum ses monatoj, de kiam li fariĝis nia samideano, li jam multe faris por nia afero. Nia nova vicprezidanto havas ian specialan talenton en plej delikata kaj sprita maniero subteni la laboremon kaj entuziasmon de niaj anoj, kaj interesigi pri la afero aliajn. Lia elekto estas nur oficialigo de lia jam antaŭa partoprenado en laboroj de la komitato, al kiu li ĉiam multe helpis per siaj praktikaj kaj prudentaj konsiloj.

Skarzysko (gub. Radomska). En ĉi tiu malgranda fabrikeja vilaĝo ankaŭ

komenciĝis movado Esperantista. Sep personoj regule kunvenas kaj studas nian lingvon, kvankam mankas al ili helpo de iu jam sperta esperantisto. Historio de ĉi tiu okazintaĵo estas la jena:

Veturante al nia Kongreso Ĉenstoĥovon S-ro D-ro M. Steckiewicz el Kielce, alparolis en vagono al siaj kunveturantoj, kiuj okaze estis gesinjoroj Lisicki el Skarżysko. Nia samideano sukcesis interesigi gesinjorojn al nia afero, invitis ilin en nian esperantan pavilonon kaj donis konvenan propagandilon. Reveninte Kielce'n, li baldaŭ ricevis proponon—aranĝi en Skarżysko paroladon pri Esperanto en la loka klubo, kies prezidanto nome estas estimata inĝeniero S-ro Lisicki, la eks-direktoro de la mineja distrikto. Estis aranĝitaj du paroladoj: la teoria de S-ro S. A. Dobrzański, kaj praktika, kun detalaj bonaj informoj pri instruado kaj lernado, de S-ro D-ro M. Steckiewicz. Tuj enskribiĝis en la liston de la lernontoj 26 personoj, sed, pro manko de l' instruisto, nur nemultaj havis kuraĝon realigi sian decidon. S-ino inĝenieredzino Lisicka kondukas tiun ĉi kurseton: kaj mem lernas, kaj helpas al aliaj, brave venkante ĉiujn malfacilaĵojn.

Kaj—la konkludo? La konkludo estas tia: ni havus sendube pli multe da tiaj esperantistaj akiraĵoj, se la samideanoj sekvus, kiel nia S-ro D-ro Steckiewicz, la bonegan konsilon de la pastro prof. Dombrowski, — ke oni devas propagandi ĉie kaj ĉiam: „en salono, en vagono, kaj eĉ en privata domo“:

Bochnia (Galicio). Ĉe ni, en Bochnia fondiĝis antaŭ nelonga tempo gimnaziana Esperanta Rondeto: „La Espero“. Ni jam finis la lernon, t. e. la gramatikon kaj ekzercojn, kaj nia rondeto prenis sur sin jam karakteron de vera rondeto. Niaj celoj estas: pliperfektiĝo en nia lingvo kaj disvastigo de Esperanto inter kolegoj. Ni legas verkojn en Esperanto kaj ni diskutas pri ili.

En plej proksima tempo ni fondos duan rondeton, por la pli junaj kolegoj. Ni estas al nia direktoro S-ro Kurowski tre dankemaj, ĉar Li estas al ni tre favora kaj niaj aferoj okupas Lin. Ni esperas, ke nia laboro alportos bonajn fruktojn.

El **Tomsk** oni skribas al ni, ke studentoj de la teĥnologia Instituto fondis tie esperantan societon, kiu konsistas el 50 anoj. La 15-an de Decembro, en la konata al ĉiuj esperantistoj datreveno, estis aranĝita solena kunveno en la universitato. La prezidanto de la soc. S-ro Skalski malfermis kunvenon per esperanta parolado, klariginte celon de la kunveno. La sekretario S-ro S. Obruĉev tralegis ruse biografion de D-ro L. L. Zamenhof. Ĉeestintoj aplaudis lian paroladon kaj ekkriis: Vivu Zamenhof! Vivu genia homo! Vivu Esperanto! Poste S-ro H. Przybylski (okazinta gasto) deklamis: „Preĝo sub la verda Standardo“. La membro de komitato S-ro Orlov havis rusan paroladon pri viveco de la lingvo esperanta. Krom tio deklamis: S-oj Skalski kaj Orlov. Dank' al agemaj kaj fervoraj membroj de Komitato ekzistas malgranda esperanta biblioteko, en kiu estas vendataj lerno-kaj legolibroj, ĵurnaloj kaj poŝtkartoj. Societo batalas kontraŭ antaŭjuĝoj kaj rutino de ĉi tiea indiferenta amaso kaj forigas kuraĝe la barojn. Estas strange, ke barojn starigas ne nur malkleruloj, sed ankaŭ scienculoj, kiel ekzemple: kunlaborantoj de progresa ĵurnalo „Sibirskaja Ĵizn“ (Sibera vivo), kiuj rifuzas artikolojn pri taŭgeco kaj utileco de la lingvo internacia. Domaĝe, ke ne ĉiu povas vidi benitan lumon de la verda stelo! En Tomsk havas grandan sukceson la kinematografoj kaj por propagando de nia ideo estus dezirataj la vidaĵoj el esperantaj kongresoj, kiuj sendube estus pli interesaj ol diversaj infanaĵoj ordinare montrataj.



La enkonduko de Esperanto en la komercaj lernejoj.

La internacia societo por la disvolvigo de l' komerca instruado, kiu ĉiujare aranĝas internaciajn kursojn kaj eldonas multe legatan revuon, tiu societo enskribis en la ĵus aperinta numero de sia revuo jenan alvokon ankaŭ en Esperanto.

„La membroj de la internacia societo por la disvolvigo de l' komerca instruado, amikoj kaj kontraŭuloj de Esperanto, estas petataj, informi nin, ĉu ili deziras aŭ malaprobas, ke la „Internacia revuo por la komerca instruado” regule publikigu en Esperanto resumojn de ĉiuj laboroj aperintaj en la revuo”.

La sama societo aranĝos kursojn en Wien nunan jaron kaj samtempe okazos grava kongreso de komercaj, profesoroj kaj studentoj de komercaj universitatoj. Tiu kongreso enmetos en sian laborprogramon temon: „Enkondukado de Esperanto en la komercaj lernejoj”.

Ĉar la prezidanto de tiu granda Internacia societo s-ro A. Junod en Bern estas nun tre fervora al nia afero, kaj ĉar jam dum la lasta kurso en Havro s-ro Karlo Bourlet faris du paroladojn kaj gajnis multe da adeptoj, ni povas esperi, ke la kongreso en Wien tre serioze diskutos pri la afero.

Samideanoj! Sendube niaj kontraŭ-

uloj estos viglaj kaj respondos al la demando de la direktata komitato kontraŭ la enkonduko de Esperanto en la revuo. Pro tio ankaŭ ni ne devas dormi sed montri al ili, ke Esperanto vivas kaj havas forton.

Ĉiu esperantista fabrikanto, komercisto, negocisto kaj komercoficisto devas rigardi kiel honora devo tuj aliĝi al Internacia Asocio por la disvolvigo de l' komerca instruado kaj voĉdoni por Esperanto. La kotizaĵo ja nur estas 1,25 s^{to} po jare. Aliĝilojn oni adresu s-ro A. Junod, departemento federala de komerco en Bern, Svisujo. Mi petas ankaŭ informi min pri la aliĝo. Se el tuta mondo membroj aliĝus al citita asocio tiu agado ne povus resti sen sukceso, kaj certigus al Esperanto la venkon tiel, ke ĝi baldaŭ eniĝus en ĉiujn komercajn lernejojn de l' tuta mondo. Se la komercaj lernejoj estos gajnitaj, baldaŭ sekvos la aliaj.

Pro tio, samideanoj de l' tuta mondo, se vi ne atentis ĉi-tiun okazon, vi ne plendu, se la komercistaro daŭrigos rigardi Esperanto kiel afero de mallonga vivado. Refutu ĉi-tiun opinion, aliĝante kiel eble plej baldaŭ al la citita asocio kaj voĉdonante por Esperanto!

D-ro M. Kandt

estro de la fako „Komerco kaj Industrio” de U. E. A.

Letero al la Redakcio.

Estimata Sinjoro Redaktoro!

Utiligante Vian afablan permeson, mi sendas kelkajn rimarkojn pri la letero de s-ro J. G.

La aŭtoro de tiu ĉi letero per kvazaŭlogika argumentado penas inspiri la leganton, ke por Esperantistoj nacieco estas nur samlandaneco, ke internacieco kaj sennacieco estas laŝamo, ke ĉiuj slavoj komprenas reciproke siajn lingvojn, ke ĉiu nacia Esperantista kongreso estas danĝera.

S-ro J. G. estas verŝajne teoria revemulo, kiu zorgas nek pri faktoj de l' reala vivo, nek pri la psiĥiko de nia nacio.

Li eble ne scias, ke verkistoj kaj ĵurnalistoj de la slavaj popoloj en Aŭstrolando en siaj slavaj kongresoj uzadas lingvon germanan, ĉar nur ĉi tiu sola lingvo estas sciata de ĉiuj en la grado bezona por diskutoj.

Esperanto estas internacia, aŭ, kiel preferas s-ro J. G., sennacia ilo de l' homa penso, sed tiun ĉi econ posedas ankaŭ, interalie la lingvo de l' muzikaj notoj, de l' matematikaj formuloj, tamen neniu opinias, ke nekonvene estus apliki ilin por celoj naciaj. Esperanton atendas la sama aluzado kaj neniu povos prospere gardi ĝin kontraŭ tio.

Plue, Esperantismo estas ne nur internacia, sed ankaŭ interpartia, interreligia k. t. p., sed, malgraŭ tio, ke ideoj religiaj povas ne

pli malbone ol la nacioj veki sangajn malpac-
ojn, en Tutmondaj Esper. Kongresoj parto-
prenas kunsidoj de Katolikoj apude de Fra-
masonoj, de Liberpensuloj kaj neniu krias:
„danĝero!”, neniu kulpigas Esperanton, ke jen
ĝi disŝiras la homaron, ĉar ĉiu komprenas, ke
la homaro estas disŝirata de ideoj kaj kaŭzoj
aliaj, pli profundaj kaj pli fortaj ol la Espe-
ranta kunluilo.

El inter la linioj de l' letero blovas in-
spiro, ke la Esperantisto devas esti adepto de
sennacieco. Tia inspiro kontraŭstariĝas al la
fundamenta propaganda tezo, ke Esperanto
per nenio minacas apartajn naciojn, kaj star-

igas Esperanton unuvicte kun aliaj fortoj, cel-
antaj pereigi nian nacion. Sur ĉi tiu vojo
Esperanto inter ni ne prosperos!

Mi pensas, ke oni povas esti sincera
Esperantisto ne kontraŭ, sed pro sia nacia
sento, kredante, ke par popoloj malfortaj Es-
peranto fariĝos iam defenda ŝildo kontraŭ
lingva supremado de najbaroj pli fortoj eko-
nomie kaj kulture, ke ĝi por la pli malfortaj
estos ŝirmilo kontraŭ humiligoj de tia speco,
kia renkontis nin, Polojn, en Internacia Medi-
cina Kongreso en Budapeŝto.

Mi restas k. t. p.

J. Chankowski.

Diversaĵoj.

Rri reklamado de la sesa.

Al ĉiuj Societoj kaj al ĉiuj Esperantaj Ĵurnaloj:

Pro la granda intereso de ĉiuj Esperant-
istoj pri la Sesa Kongreso okazonta en Va-
ŝington, „Amerika Esperantisto”, oficiala ĵurna-
lo de la Esperantista Societo de Norda Ame-
riko, deziregas komuniki al la tuta mondo, ĉi-
ujn novaĵojn pri Esperanto en Ameriko.

Do, ĉar dum 1910, ni bezonegas kunla-
boradon el ĉiuj partoj de la mondo ni pligrand-
igis nian rabaton ĝis 50%—duono! La prezo
de „Amerika Esperantisto” ekster Usono estas
m\$ 2,50, sed dum 1910 ni donos al ĉiu societo,
ĵurnalo aŭ agento rabaton da m\$ 1,25, kondiĉe:

Ĉiu mendo devos konsisti el almenaŭ
 kvin abonoj, kun pago. Se oni ne volas atendi
 ĝis kvin riceviĝas, sendu du aŭ tri kun
 pago por kvin, kaj por la mankantaj abonoj ni
 sendos kartojn, ĉiam riceveblajn kiel mono.

Oni retenu la tutan rabaton por la bo-
no de la societo, la nacia esperantista ĵurna-
lo, aŭ la individua agento. (Per bona laborado
kelkaj junaj homoj povos akiri siajn elspezojn
por la vojaĝo al la Sesa Kongreso),

Iu ajn persono povos ricevi abonojn, sen
nia permeso. Skribante adresojn, uzu maŝin-
on aŭ imitu romajn literojn.

* * *

Ni plezure sciigas al ĉiuj, ke la mova-
do en Ameriko multe pliviviĝas pro la ven-
onta Kongreso. La fundamenta laboro en Va-
ŝington komencas porti fruktojn, kaj estontaj
numeroj de „Amerika Esperantisto” estos riĉaj

je interesaj detaloj. Ni ne povos respondi in-
dividuajn demandojn — ĉiu abonu por 1910 la
ĵurnalon. Sin turni al „Amerika Esperantisto”,
700—714 E. Fortieth Street, Chicago, Ameriko”.

Ni varme rekomendas „Amerika Espe-
rantisto” kaj volonte peros al niaj legantoj en
la opa ekabono de tiu ĉi ĵurnalo je malgrandigita
prezo 1,25 m\$ = 1 rs. 25 kop. (Admin.)

Al la policianoj esperantistaj!

En Parizo kaj Dreseno ekzistas grup-
oj policanaj, kiuj laboradas por enkonduko de
Esperanto, ĉe la diverslandaj policadministra-
cioj. Jam kelkaj izolitaj policianoj petis sci-
igojn.

Sekve fondiĝis „Internacia Policasocio
Esperantista” (I. P.), kies sidejo staras en Pa-
rizo, ĉe la Polica Prefektejo mem.

Tiu asocio petas la samcelajn kolegojn
el la tutmonda policaro, ke ili sendu siajn a-
dresojn, kun respondaj poŝtkuponoj (se eble),
por ricevi sciigojn, kiuj permesos al ili parto-
preni en tiu societo, kaj helpi la esperantan
progresadon en la grava policarmeo, kaj facil-
igi la estontajn eksterajn interrilatojn pri la
policaĵ afero.

Pri tio, oni petegas ĉiujn samideanojn,
fari propagandon kaj klopodojn apud niaj sam-
profesiuloj.

Nenia kotizaĵo estas petata por parto-
preni en I. P.

Sin turni al: S-ro Miguière, policinspek-
toro, prezidanto de Polica Klubo de Paris,
Sekretario de Internacia Policasocio. Polica
Prefektejo en Paris.

Unuá Kongreso de la Italaj Esperantistoj.

Cirkulero I.

Propagandi Esperanton en Italujo kaj starigi la movadon esperantistan laŭ la sama nivelo, tiel kiel ĝi nun ekzistas ĉe la aliaj nacioj, kaj kunvenigi ĉiujn Italajn Esperantistojn por partopreni al entrepreno utila, fruktodona, nur atingebla per diversaj rimedoj studotaj, jen estas la tasko, kiun intencas plenumi la Italaj Esperantistoj. Ĉar la rimedoj estas tre diferencaj, la individuaj penadoj tro dispartigitaj, tial ĝis nun la rezultatoj ne alportis efikon esperitan de la fervoremo, laboremo de tiuj, kiuj penis por tia celo.

Tial grupo de fidelaj samideanoj, kiuj intencas forigi tiun ĝis nun sur sama loko staradon, invitas la Italajn Esperantistojn kunveni en Firenzo dum la Paskaj libertempoj.

La Kongreso ne celos la solvon de ĝenerala problemo pri lingvo internacia, ĉar ĝi konsideras tiun demandon kiel jam solvitajn, kaj ankaŭ en la kunvenaj kunsidoj ĝi nepre malakceptos ĉiujn demandojn lingvajn, preterlasonte kaj ne atentonte pri ĉiuj projektoj, kiuj ne rilatos Esperanton de D-ro Zamenhof, kies lingvo en kvin kongresoj internaciaj, kaj per mil kaj mil esperantaj publikaĵoj kaj centoj da gazetoj, montris sian taŭgecon por la celo atingota.

La Kongreso nur celos:

1. Faciligi al la Italaj Esperantistoj la rimedojn interkonatiĝi kaj naski inter iliaj vicoj ligilojn de reciproka amikeco kaj simpatio, sen kiuj komuna agado estas tute neebla;

2. Submeti al la Esperantistoj por diskutado kaj por esplorado la proponojn kaj individuajn iniciativojn;

3. Iniciati organizacion inter la Italaj Esperantistoj, kiu estonte certigos la unuecon kaj daŭrigadon de la celo trafita;

4. Alvoki al ĉiuj Italaj Esperantistoj por la fondo de grava kaj perioda eldonajo kaj starigi ĝiajn fundamentajn bazojn.

La enskribiĝo por partopreni al la Kongreso, signifos akcepton de la ĉi supra programo; la kotizaĵo estas fiksita individue je 5 liroj (5 fr.)

La Esperantistoj, kiuj deziras ĉu partopreni la Kongreson, ĉu prezenti aŭ disvolvi demandojn, estas petataj, kiel eble plej frue, pri tio sciigi la Komitaton, sin turnante al S-ro CARLO ALBERTO VITERBO, *Viale Principe Amedeo, Nr. 12, Firenze, Italia.*

Alia cirkulero pli detale informos pri la programo de la Kongreso.

La Kongreso okazos en Firenzo, de la 21-a ĝis la 23-a de Marto 1910.

La Italaj Esperantistoj estas insistege petataj ne preterlasi tiun iniciativon, kies plej granda bono estas atendebla de ĝia efektiviĝo por nia kara Esperanto!

La Komitato.

*Stefano la Colla, R.-J. Hall,
Gualtiero Baynes, C.-A. Viterbo.*

Letero el Italujo.

Tre karaj Samideanoj!

Estas de Vi jam bone konate, kiom malmulte Esperanto progresis ĝis nun en Italujo, kiom malmulte sukcesis la penadoj kiujn de kelkaj jaroj faris iuj fervoruloj. La kaŭzon oni devas aldiri al la skeptikeco per kiu la plimulto da Itallandanoj, eĉ kleruloj, akceptas la dirojn de tiuj, kiuj klopodas disvastigi la ideon de Lingvo Internacia. Tial ke la *sola* rimedo estas montri efektivan uzadon de Esperanto.

Tion komprenis la respektinda Direkcio de *Illustrazione Militare Italiana*, kiu kun fervoro vere laŭdinda, anstataŭ kriegi per senutilaj paroloj, komencas publikigi artikolojn en Esperanto, kiel Vi mem konstatos el la numero de ni kunsendata.

Sed Vi bone komprenas kiomaj estas la elspezoj faritaj kaj farotaj pro tiu publikigado kaj pro la sennombraj demandoj el ĉiu flanko ricevataj, kiujn oni devas respondi vaste, se oni deziras fari veran propagandon.

Nun Vi vidas, karaj Samideanoj, kiel necese estas subteni tiun ĉi iniciativon, el kiu *sole* devenos la progresado de Esperanto en Italujo; Vi komprenas kia malutilo neregajnebla estus la interrompo de l' publikigo de artikoloj por kaj en Esperanto.

Al Vi do ni turnas nin, petegante, ke via Societo aŭ Grupo abonu la belegan Revuon kaj, ĝin konigante, klopodu por havi multon da abonantoj. Via sencesa kaj fervora agado por la sukceso de nia ideo, sendube jam montris al Vi, ke tute senutila estas la disvastiĝo de Esperanto en unu nacio, se la aliaj landoj ne partoprenas la movadon.

La Revuo publikiĝas la 5-an kaj la 20-an de ĉiu monato sur luksa papero kaj kun multo de ilustracioj. Malgraŭ sia titolo ĝi ne estas definitiva nur por militistoj, sed entenas artikolojn pri ĉiu fako de la nuntempa homarvivo.

La jara abonprezo estas en Italujo L. 12 kaj en Eksterlando 20 fr. (7.92 ₡) sendotaj al *Amministrazione dell' Illustrazione Militare Italiana, 103, Via Tomacelli, Roma*, aŭ al *Sro Primo Dottarell, Konsulo de Esperanto, 29, Via Belsiana, Roma.*

Ni Vin kore salutas kaj dankas:

Kolon. *Alessandro Guindani*
Prezidanto de I. C. R. E. S.

BIBLIOGRAFIO.

„Pola Esperantisto“ raportas nur pri verkoj alsendotaj
al la redakcio en du ekzempleroj.

ESPERANTISTA POŝKALENDARO
JARO 1910, eldono de Esperanto Verlag et
Borel, Berlin S. W. 68.

Tiu bonega kaj akirinda por ĉiu espe-
rantisto poŝkalendaro daŭrigas sian kvarjaran
ekzistadon. Ni varme ĝin rekomendas al ni-
aj legantoj, ne nur kiel bonegan memorand-
umon, entenantan ĉiujn necesajn sciigojn kon-
cernantajn Esperanton, sed ankaŭ, kiel opor-
tunan kalendaron.

ESPERANTA BIBLIOTEKO INTER-
NACIA № 7. *El dramoj*, prezo 0,10 ₡. Ber-
lin Esperanto Verlag Möller et Borel.

La 7-a libreto de tiu ĉi biblioteko en-
havas fragmentojn el „Ifigenio en Taŭrido“
de Goethe kaj el „La Rabistoj“ de Schiller
en la traduko de D-ro L. L. Zamenhof.

ESPERANTA BIBLIOTEKO INTER-
NACIA № 8, *El komedioj*, prezo 0,10 ₡.
Berlin, Esperanto Verlag et Borel.

Ĝi enhavas esperantigitajn fragmentojn
de D-ro L. L. Zamenhof el „La Revizoro“ de
Gogol kaj el „Georgo Dandin“ de Molière.

LA KORMALSANOJ ILIAJ KAŬZOJ
KAJ KONTRAŬBATALO, priskribis populara
de D-ro O. Burwinkel, banloka kuracisto en
Bad Naŭheim, esperantigis D-ro Kunschert,
kuracisto en Wiesbaden, prezo 0,50 ₡. Ber-
lin S. W. 68 Esperanto Verlag Möller et Borel.

La kormalsanoj estas bedaŭrinde unu el
la plej oftaj malfeliĉoj de l'suferanta homaro,
kontraŭbatali ilin estas tasko ofte tre malfa-
cila. La plejbona kontraŭrimedo estas pru-
denta higieno. D-ro Kunschert havis boneg-
an ideon diskonigante la bonan verkon de
D-ro O. Burwinkel inter esperantistoj, inter
kiuj kredeble ne ĉiuj havas tute sanan koron.
Per tiu ĉi verketo la tradukinto pligrandigis
nian sciencan literaturon ke diversaj special-
aj teknikaj esprimoj en medicino estas tute
facile esperantigeblaj.

LA KOLOMBA PREMIO de Aleksan-
der Dumas, esperantigis Benedict Papot. Pre-
zo 0,40 ₡. America Esperantist Company.
Chicago; akirebla ĉe Amerika Esperantisto
Chicago 700 E 40-th street.

LA MOPSO DE LIA ONKLO de R.
M. Chase, prezo 0,40 ₡. American Esperan-
tist Company, Chicago; akirebla ĉe „Ameri-
ka Esperantisto“ 700 E, 40-th street. Chicago.

BELGA ADRESARO ESPERANTISTA
1910, kunmetita kaj eldonita de „Centra Es-
perantista Belga Oficejo. 1 vol. — 156 paĝa,
prezo fr. 0,50, eksterlande 0,75. Antwerpen
49, kleine Beerstraat.

De la Redakcio.

La Redakcio ricevas multajn le-
terojn koncerne diversajn demandojn.
Ĝis nun ni penis respondi al ĉiuj pli
gravaj leteroj. Ni volonte respondos al
ĉiuj leteroj, sed nur, se estos sendita
respondkuponon aŭ respondita poŝta kar-
to. Ni estas devigitaj tion ĉi fari pro
ekonomiaj kaŭzoj, kiuj por nia organo
ne estas indiferentaj.

Krom tio ni ricevas multegon da
literatura materialo kun peto, ke ni re-
spondu en la organo, ĉu ĝi estos pres-
ita aŭ ne. En la lasta tempo ni ĉesis
publikigi tiujn respondojn de la Redak-

cio, ĉar efektive estas iafoje malfacile
tuj decidi pri presindeco de tiu aŭ
alia artikolo. Ofte alsenditaĵoj, kiuj ŝajn-
as en la unua momento presindaj, poste
pro diversaj kaŭzoj okazas ne presind-
aj kaj kontraŭe. Tial ni decidis, ko-
mencante de la estonta numero respondi
nur en okazoj tute sendubaj t. e. pri
materialo senkondiĉe bona aŭ malbona.

Bonan solvon de la kapludilo pres-
ita en 10 numero de „P. E.“ sendis
krom la personoj cititaj en la antaŭa
numero, ankoraŭ S-ro H. Przybylski el
Tomsk.

Solvo: ko—lo—fo—no.

La listo de Abonantoj de „Pola Esperantisto” en 1910 jaro

(krom ĉiuj Membroj de Pola Esper. Societo en Varsovio).

1. Butz Zenon, Tuszyn; 2. Kotela Teodor, Zawiercie; 3. Pinko C. S. S., Piotrków; 4. Reiner Antoni St., Sambor—Galicja; 5. Vacqueret E., Jekaterynodar; 6. Pearson M., Sheffield, Anglija; 7. Żurakowski Jan D-r, Humani; 8. Lasky Woyt, Seattle, Washington; 9. Tymiński Kazimierz, Warszawa; 10. Żelechowski Fr., Dźwiński; 11. Wyczółkowski Stefan, Chelm; 12. Jablkowski, Irkutsk; 13. Baran Jan, Ostrowiec; 14. Szepe Stefan, Sejny, gub. Suwalska; 15. Gluchowski Bolesław, Kutno, wieś Klonowiec Chłopski; 16. Sochacki D-r, Iwangród; 17. Kacperski Stefan, Białobrzegi; 18. Wojciechowski, st. Będzin; 19. Wojciechowski, Kolo; 20. Pieńkowski A., Łódź; 21. Gruza Józef, Osiećiny; 22. Borkowski Zenobiusz, st. Piszczac; 23. Vilna Esperantista Societo, Wilno, Trocka 14; 24. Piątek Jan, w Paszyczynie, o. p. Dębica; 25. Księżopolski Ed., Knyshyn; 26. Nowakowski Fr. Ks., Maków, wieś Gąsewo; 27. Gilda L., Częstochowa; 28. Stubiński Wl., Zaklików; 29. Krassowski M. D-r, Gargolin; 30. Govaertz, Hamond; 31. Sebert General, Paris; 32. Werner Amelja, Rokitno, wieś Salicha; 33. Nowelt Józef, Lublin; 34. Demidowicz, Moskwa; 35. Radziński Br., Zaporozie Kamienskoje; 36. Żegliński C. W., Poltawa; 37. Randall Chas E., Seattle Washington, Ameryka; 38. Clarence L., Dean, London; 39. Graff Aleksander, Uładówka; 40. Pechkranc Adolf, Warszawa; 41. Kowalski Władysław, Wilmington Del Ameryka; 42. T-wo Biblioteki Publicznej, (bezpłatnie) Kielce; 43. Chaussard E., Orleans, France; 44. Kostroma Filio de R. E. S., Kostroma; 45. Niewęglowski Karol, Wilno; 46. Vilna Esperantista Societo, Wilno; 47. Twarowski, Biała Siedlecka; 48. Zborowski Józef, Bolesław, wieś Dietrzkowice; 49. Bleiski Cz., Opole Lubelskie; 50. Nowak Józef, Box 332 Galitzen Pa, North America; 51. Dietl Wilhelm D-r, Graz 10, Austria; 52. Żencykowski Józef D-r, Płock; 53. Królikowski Henryk, St. Petersburg; 54. Zambrzycki Władysław, Belgique, Mons Avenue; 55. Lisicka, Skarżysko; 56. Gingold A. D., Nasielsk; 57. Zakrzewski Aleksander, Jekaterynodar; 58. Dzieciotłowski Bolesław, rejent, Ulanów, Galicja; 59. Wolański Roman, Ulanów; 60. Esperanta Rondeto, Bochnia; 61. Talat-Kielpsz St., Krasnystaw; 62. Skrzypiński Władysław, st. Zagbkowice D. Z. W. W.; 63. Dobrowolski Leon, Lublin; 64. Sokolnick R. M., Olkieniki, gub. Wileńska; 65. Berend A. F., Rawa; 66. Bienkowski Fr., Zaleszczyki, Galicja; 67. Romański Zygmunt, Dublany, obok Lwowa; 68. Kowalski Paweł, Krzepice; 69. Zaleski F. D-r, Kutais; 70. Łączyński Leon D-r, Turck, gub. Kaliska; 71. Ettinger A., Zychlin; 72. Nawrocki Kazimierz, Będzin; 73. Artymowicz Antoni, Uładówka, gub. Podolska; 74. Ciesielski Władysław, Łódź; 75. Chankowski Józef, Nowo-Mińsk; 76. Szumkowski S. D-r, Grodno; 77. Szurek Józef Ks., Pohorce obok Komorna; 78. Święcicki Bolesław, Żębin, wieś Zakaluże; 79. Nowak Franciszek, Kalisz; 80. Tymanowicz W., Warszawa; 81. Brodzińska J., Siedlce; 82. Porębska Marja, w Szarnypolu, p. Cybulewo; 83. Mońkowski Leon, Częstochowa; 84. Dobrzyński Jakób, w Rudnikach; 85. Spero M., Pretoria, Transvaal;

86. Gruszczyński Jan, Rudnik alSan; 87. Kuprewicz Julian Ks., Szyleli, gub. Kowieńska; 88. Lesiewicz Remigiusz, m. Kalwarja, gub. Suwalska; 89. Sulicki Bolesław, Warszawa; 90. Bernard Adam, Almaznaja, Jekateryn. gub.; 91. Prieto Pedro Ruiz Sevilla, Hiszpanja; 92. Sercaz Izidor, Będzin; 93. Polische Akad. Lezezimmer, Cöten (bezpłatnie); 94. Adler Artur, Lwów; 95. Baumgartenówna Ernestyna, Lwów; 96. Bobinowa Fryderyka, Lwów; 97. Brandesówna Rozalja, Lwów; 98. Burzyńska Jadwiga, Lwów; 99. Chrzowa Izabella, Lwów; 100. Einschlag Emilia, Lwów; 101. Fels Izidor D-r, Lwów; 102. Hempel Helena, Lwów; 103. Herold Benedykt, Lwów; 104. Katzówna Różia, Lwów; 105. Krach Adam, Lwów; 106. Lezerowa Salomea, Lwów; 107. Lewiński Kazimierz D-r, Lwów; 108. Łazica Stanisław, Lwów; 109. Niżnik Władysław, Lwów; 110. Pajor Laurenty, Lwów; 111. Ptaszyńska Apolonja, Lwów; 112. Rozenkranz Achilles D-r, Lwów; 113. Skalkowski Bronisław D-r, Lwów; 114. Szczerban Adolf, Lwów; 115. Szczęściakiewicz Stanisław, Lwów; 116. Tauszyńska Emma, Lwów; 117. Tornowa Rozalja, Lwów; 118. Wierzchowski Hieronim, Lwów; 119. Zwach Franciszek, Lwów; 120. Zatezky Edward, Lwów; 121. Domoślowski Kaz., Warszawa; 122. Swiderski Kaz., Warszawa; 123. Światły Wawrz., St. Melnicznaja; 124. Hagen Robert, Zgierz; 125. Sauter Edw., Strzyżowice poczta Będzin; 126. Gąprawski Sylw., Strzyżowica poczta Będzin; 127. Radziński Br., Zaporozie-Kamienskoje; 128. Jungton Mary, Fort-Wayne lud; 129. Romanowski Konst., Kalwarja Suw. gub.; 130. Bostona Esperanta Societo, Boston Mass; 131. Wierzbęta A., Siedlce; 132. Kurelski Witold, Łomża; 133. Wiślicki Czesław, Białobrzegi, Stawiszyn; 134. D-r. Kunszyński, Czerniewice; 135. Jankowski Roman, Solec, gub. Radom.; 136. Kleczyński Miecz., Szepietowska; 137. Wonago R. J., Chandaochedry; 138. Szachowski Julian, Tyflis; 139. Kwek Jan, Kompaniejska; 140. Korabiowski Bernard, Rzeszów; 141. D-r, Möbusz A., Lübeck Germanijo; 142. Trosczyński, Brus. Łódź; 143. Radziński R., Wołkowysk; 144. Kozerański J. Miecchów; 145. Muszyński Jan, Dorpat; 146. Krobhan Stefan, Teodazja; 147. Taussig E., Prag Bóchnmjo; 148. Wardek Im. Edmibur; 149. Grygoński Józef, Częstochowa; 150. Krawczuk Aleks., Rio de Janeiro, Brazil. 151. Schubert B. F., Washington G. D. C.; 152. Maske Rud, Drezn; 153. Stacha Piotr, Dąbrowa Górnicza; 154. Skinder Helena, Wilno; 155. D-r, Niedzwiedzki, Mińsk; 156. Przybytek Kaz., Petersburg; 157. Degentesz, Krasnojarsk; 158. Ks. Światopełk-Mirski Leon Krasnojarsk; 159. Iwanicki Aleksander, Petersburg; 160. Lembke G. F., Kijów; 161. D-r, Goldenberg Ark., Łódź; 162. St. Gluchowski, p. Waganiec, Bądków; 163. Pror, Łódź; 164. Kozłowski L., Zwierzyniec, gub. Lubelska; 165. Gorski Cz., Kańsk, gub. Jonisejska; 166. Gubernialny Zarząd Akcyzny, Kursk; 167. Widkowski K., Philadelphia P. A.; 168. Loth E., Zürich; 169. Majewski K., Stretiensk, Zabajkal. obl.; 170. Szymański Wl., Lublin; 171. Rudnicki St., Kraków (Societo „Esperanto”).

OFICIALA GAZETO ESPERANTISTA

Organo de la Lingva Komitato
kaj de la

Konstanta Komitato de la Kongresoj
Jara abono: 5 fr.

Redakcio kaj Administracio: Paris 51, Rue
de Clichy.

Duonmonata internacia gazeto

„ESPERANTO“

Organo de Universala Esperanta Asocio. La plej
ofta, la plej legata!

Aperas en granda jurnala formato.

Enhavo tre diversa kaj interesa.

Jara abono 4 fr.—Sm. 1.60. Unu numero 15 cm.

Direkcio: 8, rue Bovy Lysberg
Genève (Svisujo).

„VOĈO DE KURACISTOJ“

MONATA ORGANO POR LA INTERNACIA
KORESPONDADO DE KURACISTOJ EN LA
AFEROJ PROFESIAJ, ETIKAJ KAJ SOCIAL-
MEDICINAJ.

aperadas en Lvovo la 1-an de ĉiu monato.

Redaktoro: D-o Szczepan Mikołajski.

Jarahono 1,50 sm.—3,60 kr.—1,50 rb.—3 mrk.—4 fr.

Adreso de la redakcio kaj administracio:

D-r Szczepan Mikołajski, Lwov, str. Sniadeckich 6, Aŭstrio-Galicio.

Większy Słownik Polsko-Esperancki

Ant. Grabowskiego.

Wyszedł z druku III-ci zeszyt 8 ark., (od Pod do Skrz).

Cena z przedpłatą za całość—1 rb. 40 kop.

Nakład księgarni M. Arcta

WARSZAWA

Nowy-Świat 53.

Przygotowane są do druku A. Grabowskiego: Większy Słownik Esperancko-Polski oraz skróty obydwu słowników.

!!Dla Esperantystów!!

Jedyna maszyna do pisania

„Polyglott Nr. 2“

w językach: polskim, *esperanckim*, rosyjskim i innych, *bez zamiany alfabetu*, oraz maszyny innych systemów amerykańskich i angielskich fabryk. Taśmy, części i przyrządy do maszyn do pisania.

Sprzedaż za gotówkę i na rozplaty.

Jedyny przedstawiciel
na Królestwo Polskie

Juljan Berg,

WARSZAWA,

Mazowiecka Nr 11,

Tel. 54-81.

„Lingvo Internacia“

Centra Organo de la Esperantistoj.

Eliranta inter la 15, kaj la 20, de ĉiu monato.
La plej malnova el ĉiuj gazetoj, Esperantistaj
fondita en 1895.

La plej enhavoriĉa! La plej malkara!

48 paĝoj da dense fr. (2 ^{fr})
presita teksto en 5 abonprezo
plej korekta kaj por
plej klasika stilo unu jaro.

Por ricevi specimenon oni sendu unu poŝtan respond-kuponon.

Preso Esperantista Societo, 33, rue Lacépède, Paris.

Obszerny Słownik Esperancko-Polski

zawierający około 7000 pierwiastków i słów
pochodnych

ułożył St. Czarnowski.

Cena 60 kop.

Do nabycia w księgarniach

Wolne Słowo

Dwutygodnik polityczny, społeczny, literacki i naukowy pod redakcją

Leo Belmonta

Prenumerata roczna z przesyłką 6 rb. 60 k., półroczna 3 rb. 40 k., kwartalna 1 rb. 75 k. Zagranicą rocznie 7 rb.

Warszawa, Marszałkowska 77, tel. 118-98.

LIBREJO de M. ARCT

en VARSOVIO,

Str. Nowy-Świat 53.

vendas ĉiujn librojn pri kaj en

ESPERANTO:

Libroj, tekstoj en Esperanto
Lernolibroj

Vortaroj

Broŝuroj propagandaj

Literaturo

Scienco

Muziko

Poŝtkartoj

Jurnaloj

Oni mendu la katalogojn,
kiuj estas sendataj senpage.